

juna amiko

majo 2020 • n-ro 2/2020 (163)




PROGRESIGA REVUO
POR LEGANTOJ
INTER 10- KAJ
100-JARAĜAJ

Evento: Transjara Kurskunveno de EPA.
Konversaciaj temoj: Dialogoj dum la trudizoliĝo.
Brazila fabelo: Lertaj klaŭnoj ĝojigas homojn.
Lude: Pli bona pano sen butero, ol dolĉa kuko sen libero.
Interkultura Mondo: Filmfestivalo Mia Asocio, Mia Urbo.

Aŭtoro: Ernesto Padrón
 Tradukisto: José de Jesús Campos Pacheco

Kolibrido



Enhavo kaj kolofono



Enhavo



Enkonduke: Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) 4



Konversaciaj temoj: Dialogoj dum la trudizoliĝo (Judit Felszeghy, HU) 5



LUME: El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) 10

Mitologio: La reĝo de serpentoj (Martin Ptasinski, DE) 11



Eldonanto de Juna amiko: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Jura sidejo: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejo:** sub reconstruo ĉe ilei.mondo.info. Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko. La numeroj de 0 ĝis 138 (1972 ĝis 2014) estas publike legeblaj ĉe: <http://www.eventoj.hu/juna-amiko/>. Vidu ankaŭ lernu.net kaj edukado.net. **Redaktoro:** Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), marcek@gmail.com aŭ redakcio@gmail.com. **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio) kaj Utho Maier (Germanio). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónica Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto:** Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto:** Sebastian Cyprych, ilei.oficejo@gmail.com. **Landaj Perantoj** sur la p. 39. La sekva numero aperos en septembro 2020. **Limdatoj por sendi kontribuojn:** ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** € 18 en tiel nomataj A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).

ISSN 0230 1318



Fabelo: Lertaj klaŭnoj ĝojigas homojn (Jozefo de J. Campos Pacheco, CU) 12



Kantu kun Juna Amiko: La jaro de l' viruso; Reklamo al silento (Małgosia Komarnicka, PL) 13

Elstaraj virinoj: Eleanor Roosevelt (Renée Triolle, FR) 15



LUDE, la unika dua etaĝo: Pli bona pano sen butero ol dolĉa kuko sen libero (Mónika Molnár, CH) 16

Anoncoj: Virtuala Konferenco de ILEI (Mireille Grosjean, CH) ... 19

Rakonto el Nov-Zelando: Maoria legendo Rona kaj Luno (Craig Williams, NZ) 21



Legu librojn – premioj – konkursoj:

Klubo de bona libro. Ek-konu mian landon pere de ĝia legendo. (Małgosia Komarnicka, PL) 22



Kiom stultan ideon mi havis... (Mireille Grosjean, CH) 28

Recenzo: Fascinaj kutimoj kaj festoj (L. Carol, IL) 29

Poemo: Vero vivos (Luiza Carol, IL) 30



Interkultura

Mondo: Film-festivalo Mia Asocio, Mia Urbo (Elena Nadikova, RU) 31

Mortanonco: Mila van der Horst-Kolińska (Małgosia Komarnicka, PL) 35

Evento: Transjara Kurskunveno de EPA 37



LASTE, la tria etaĝo: AMO (Aktivula Matur-igo) tra la ŝtormo (Stefan MacGill, NL/HU) ... 38



Karaj amikoj!

La neatenditaj “koronvirusaj ferioj” (“maskobalo”? 😊) kaŭzas, ke multaj el ni devis resti hejme. Por agrablighi al vi tiun situacion *Juna Amiko* decidis alporti al vi multajn agrablajn legaĵojn, sed ne nur: kun *Juna Amiko* vi nun povos ankaŭ aŭskulti sonlibrojn kun prozo, poezio kaj fabeloj – kaj ankaŭ aŭskulti kaj lerni kantojn en Esperanto, eĉ spekti multajn Esperantajn filmojn!

Frontpaĝo de tiu ĉi numero montras, ke ankaŭ lernantoj de Esperanto dum Transjara Kurskunveno en Japanio amas Esperanton. Sur la dua paĝo kaj sur la dorso vi povas denove ĝui du belajn komiksojn aŭ bildstriojn. En nia rubriko *Konversaciaj temoj* vi povos lerni interesajn dialogojn dum nia “trudizoliĝo”. Via mondo denove farigis buntkolora kaj pli riĉa danke al la rubrikoj *Lume* kaj *Lude* (kvaranteno de la katoj!).



Vi konatiĝos kun mitologio de sorboj, kun mistera rakonto el Novzelando, kun elstara virino el Usono, ĝojigos vin fabelo pri brazilaj klaŭnoj, vi rememoros pri la malnovaj filmoj pri *Lupo kaj Leporo* – kaj meze kreos kaj sekve vizitos vian novan propran landon *Ĝojlandon*, kiu ne troviĝas sur mapoj, sed jes en ĉies koro... Vi povas kun *Juna Amiko* ankaŭ konatiĝi kun fascinaj kutimoj kaj festoj en Ĉinio, kaj en Jutubo (*Youtube*) mem spekti 35 popularajn Esperantajn filmojn pri 30 urboj sur 5 kontinentoj, el la filmfestivalo “Mia Asocio, Mia Urbo”, komuna projekto de Universala Esperanto-Asocio kaj Ĉina Radio Internacia. “Sur la tria etaĝo”, en la rubriko *Laste*, vi konatiĝos kun seminarioj pri Aktivula Maturigo dum la virusa ŝtormo.

Via redaktoro kaj aŭtoroj de la artikoloj kredas, ke *Juna Amiko* alportas al vi multon interesan, instruan kaj ĝojigan dum via deviga hejma restado.

Via redaktoro

Stano Marček

Karaj legantoj!

Mi tre ĝojis, kiam mi malkovris tiun ĉi numeron de *Juna Amiko*. Bunta, varia, enhavoriĉa, lerniga, interesa ĝi estas. Mi tre ĝojis, kiam mi malkovris la nomojn de tri novaj aŭtoroj, mi volas bonvenigi ilin kaj danki ilin. Mi tre ĝojas vidante la kovrilpaĝon de nia revuo, kaj se vi rigardas tiun ĉi foton de mi, vi tuj komprenos. Mi partoprenis la Transjaran Kurskunvenon fine de la jaro 2008, kiam mi restadis en Japanio dum ses monatoj. Mi prelegis, vidu la podion, komparu ĝin kun tiu de la kovrilpaĝo. Mi instruis Esperanton de la mateno ĝis noktomezo, preskaŭ dum 5 tagoj.



La japana kutimo volas, ke iu grupo, kiu kunvenas por iu komuna celo, praktiku tiun celon en la momento de la jarŝanĝo. Mia aikidomajstro en Svislando metis trejnadon la 31-an de decembro je la 22-a horo kaj ni kune aikidumis ĝis la dua matene. En Kameoka ĉe Oomoto, ni parolis kaj studis Esperanton ĝis la dua matene, kaj post tio la festo komenciĝis, nur post la jarsalta momento. Tiu Transjara

Kurskunveno de Oomoto estas grava evento en la Esperanto-movado, same kiel la Komuna Seminario (KoSo), kiu arigas junulojn el Koreio, Japanio, Ĉinio, Vjetnamio. Estas lumturoj en la multnombraj eventoj de la Movado.

Mireille Grosjean
prezidanto de ILEI

Dialogoj dum la trudizoliĝo

Help-materialo por progresemluloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy

Komence de la jaro 2020 tra la tuta mondo disvastiĝis pandemio. Por malhelpi la disvastiĝon de la koronaviruso, la registaroj en multaj landoj enkondukis trudizoliĝon. Dum la trudizoliĝo de tiu terura pandemio mi notis kelkajn, tute ordinarajn dialogojn.

I.

En multaj landoj la lernejoj kaj universitatoj ne akceptas vizitantojn. Kutime la lernantoj kaj studentoj lernas hejme, helpe de retaj studhoroj. Tiaj instruado kaj lernado ne ĉiam estas facilaj. Sube du patrinoj de samklasaj lernantoj babilas skajpe: Diana (D), la patrino de Aminda, kaj Marta (M), la patrino de la alia lernanto.

D – Saluton, Marta! Pardonu pro la ĝeno, sed mi bezonas urĝan helpon! Temas


pri la hejmtasko pri matematiko. Aminda tute ne komprenas la taskon. Hieraŭ vespere mi jam montris tion ankaŭ al mia edzo, ni sidis super la tasko, antaŭ la ekrano dum unu kaj duonhoro, diskutadis, sed sen rezulto. Ĉu via filo, aŭ vi, jam solvis ĝin?


M – Saluton Diana! Bone, ke vi skribis al mi, ĉar mi jam mem volis vin demandi, ĝuste rilate la hejmtaskon pri matematiko. Bedaŭrinde, ankaŭ ni ne povis solvi ĝin. Mi ne scias, ĉu la instruistino ne klarigis al la infanoj, kiel oni povas plenumi la taskon? Ĉu eble voki telefone la instruiston? Ĉu demandi la lernanton, kiu estas tre lerta pri matematiko? Se mi bone scias, li nomiĝas Karlo. Ĉu skribi al li per skajpo, por demandi lin?

D – Jes, donu al mi la nomon aŭ la telefonnumeron, laŭ kiu mi povos trovi tiun Karlon.

(... kaj la sekvan tagon:)

D – Finfine sukcesis! Koran dankon ankaŭ al vi! Hieraŭ vespere la patro de Karlo sendis al mi la tutan priskribon de la solvo. Li estas tre simpatia ulo, nomiĝas same Karlo. Li estas ĉefingenero de iu konata firmao, kiu okupiĝas pri komputila teknologio. Mi diris al li, ke li meritas esti salajrata ankaŭ kiel instruisto dum la periodo de la hejma reta lernejo!



**II.**

Multloke oni proponas, ke oni, precipe la pli aĝaj personoj, ne iru al la vendejoj, sed mendu la varojn rete. Ĉi-sube geedza paro deziras mendi varojn rete, la edzo (E) kopias la liston sur la retpaĝo, kiun la vendistino (V) tuj akceptas kaj respondas.

V - Bonan tagon, mi estas Kristina, el la vendejo „Ĉion por vi”. Pri kio mi povas helpi vin?

E - Bonan tagon, ĉu vi akceptas mendojn pri nutraĵo?

V - Jes, bonvolu listigi, kion vi deziras.

E - Dankon. Ĉu mi povas dikti la liston al vi? Mi legas la liston, kiun mia edzino skribis por mi. 4 litrojn da lakto, longdaŭra. Buteron, du pakajetojn po 250 gramoj. Tri parojn

da frankfurta kolbaseto, el porkaĵo, ne el kokidaĵo. 4 aŭ 5 belajn porkajn tranĉaĵojn, sengrasajn, mi petas. Krome legomojn, 3 aŭ 4 karotojn, 2 mezgrandajn petroselajn radikojn, 2 brasikrapojn.

(Al la edzino, voĉe:) - Kion? Ne, mi ankoraŭ ne skribis. Nun mi skribos tion.

Se vi havas petroselon, 1 bukedon, bonvolu. 4 kilogramojn da terpomoj, 1 litron da sunflora oleo, 6 skatolojn da biero.

(Al la edzino, voĉe:) - Ne, kara, tio tute ne estas multe. Venos la semajnofino... Se eblas aĉeti ankaŭ lavilon, mia

edzino demandas, kiun markon vi havas. Fluidan.

V - Ni havas la markon „Cigno” por blankaj teksaĵoj, kaj „Ĉielarko” por la buntaĵ.

E - El ambaŭ ni petas po unu.

V - Ĉu ion ankoraŭ?

E - (Al la edzino, voĉe:) - Ĉu ni prefere aĉetu ankoraŭ iom da kuko? Ne? Ah,



do, vi mem preparos. Bonege!


Dankon, jen ĉio. Kiel mi pagu?

V - Se vi klakas al la verda butono sube, aperas via fakturo. Vi aprobos ĝin per la sekva alklakado. Poste vi decidus pri la liverado, kaj skribu tien vian adreson. Fine vi aldonos la datumojn de via kreditkarto.

E - Koran dankon fraŭlino, por la helpo!

V - Volonte, mendu ankaŭ alian fojon ĉe ni! Ĉion bonan!

E - (Al la edzino, voĉe:) - Vidu, kiel simple! Krome, ni ne devas zorgi pri la liverado. Ni faru same ankaŭ la sekvontan fojon! Sed, eble kun iom pli da biero, kaj ni provu ankaŭ la kukojn!

**III.**

En multaj landoj fermiĝis la kinejoj, teatrejoj, oni ne rajtas viziti la kutimajn klubojn, eĉ ofte ankaŭ la sportajn halojn, ejojn por trejnado. Nun ege mankas la regula sporto al multaj, kiuj al kutimiĝis al tio. Legu la retan korespondadon de du amikoj, Boriso (B) kaj Gustavo (G), sube!

G - Saluton Amiko, kio pri vi? Mi jam duone freneziĝas pro tiu koronaviruso! Jam de pli ol unu monato mi sidas hejme. Eĉ la butikumadon plenumas nur mia edzino. Post ellitiĝo mi sidas sur kanapo, spektas la televidajn programerojn, poste mi sidas sur la kuireja seĝo dum tagmanĝo, de tie mi iras denove al la kanapo por iom ripozi, poste mi sidas sur la komforta brakseĝo por kafumi. Ne eblas iri al la bierejo ĉe la stratangulo por renkonti konatojn, ĉar ĝi estas fermita. Ne eblas spekti matĉon de futbalo en la urbocentra stadiono, ĉar ankaŭ ĝi estas fermita. Ne eblas iom promeni en la proksima parko, ĉar la parko estas fermita. Plej multe mankas tamen la sporta trejnejo, ĉar kompreneble ankaŭ ĝi estas fermita. Kiel vi eltenas tiun periodon? Vi ja eĉ ĉiutage sportumis! Ĉu vi ankoraŭ sportumas ie? Donu al mi konsilon, mi petas!

B - Gustavo, mi bone komprenas vin! Tiu tempo estas ankaŭ por mi malfacila, kiel por ni ĉiuj, tra la mondo.

Vi tamen estas en pli favora situacio, ĉar vi ne estas sola! Mia amikino loĝas eksterlande, kaj ni ne scias, kiam ni povos revidi unu la alian denove. Kiam oni fermis la trejnejon, mi pensis: se mi ekde nun ne moviĝas, sed nur sidas en unu loko, poste en iu alia, mi pigriĝos, dikiĝos, kaj tio estos malutila por mi. Do, mi iras al iu restoracio piede, por alporti por mi la tagmanĝon; tio estas proksimume



5 kilometroj tage. Krome, mi malkovris en la televido programon pri gimnastiko, kvankam ĝi estas tro facila por mi, mi sekvas ĝin. Tion mi proponas ankaŭ al vi, Gustavo! La programon vi trovas ĉiumatene ekde la 06.45 en la kanalo 6, kaj ankaŭ posttagmeze, ekde la 17.45. Ĝi daŭras eble 15 minutojn.

G - Dankon, Boriso! Mi nepre trovos kaj ankaŭ provos la programon! Sed ĉu al vi ne mankas nia komuna trejnado kaj la posta bierumado?

B - Tio certe mankas ankaŭ al mi! Ne nur la bone ekipita ejo kaj la diversaj trejniloj, sed ankaŭ la tieaj knaboj! Bona kompanio kuniĝis tie! Hejme



mi havas du parojn da peziloj, du po 3 kilogramaj kaj 2 po 5 kilogramaj. Mi ekzercas min per ili ĉiutage. Krome mi ankaŭ gimnastikas ĉiun duan tagon, sed almenaŭ 3 fojojn semajne po unu kaj duonhoro.

- G – Kiujn ekzercojn vi povas fari hejme?
 B – Ekzemple mi faras iun enkondukan gimnastikadon, kaj poste mi alterne plenumas diversajn ekzercojn. Mi ekzemple faras kuŝ-apogojn, ŝnur-saltadon, rano-saltadon, ventro-leviĝon po cent aŭ ducent. Certe hejme ne estas tiel entuziasme, kiel en la trejnejo, sed necesas iom sportumi, por eviti enuiĝon kaj dikiĝon, ĉu ne?
 G – Vi pravas Boriso. Anstataŭ levadi la bierkruĉon, mi prenos pezilojn, kaj anstataŭ apogi min sur kusenoj, mi plenumos kuŝ-apogojn, kaj anstataŭ plu dikigi la ventron mi klopodos fortigi ĝin.

IV.

Multaj planis por la frua somero vojaĝojn, sed la landlimoj fermiĝis, la ripozlokoj ne akceptas gastojn. Kion eblas fari? Legu, kiun solvon trovas la du amikinoj, Karina (K) kaj Erika (E), kaj kion proponis la hotelo (H).

- E – Saluton Karina, mi vidas, ke vi nun ĉeestas ĉe skajpo. Mi volis demandi vin, kio okazos pri nia ferio? Mi ĵus legis en la reto, ke la pandemio ankoraŭ ne malaperos de unu tago al la alia, kaj eble ni ne povos veturi post tri semajnoj al Belurbo. Kion ni faru?
 K – Saluton! Ankaŭ mi pensis pri tio. Prefere mi tuj skribu al la hotelo, kaj demandu hoteliston. Mi ne volas, ke nia anticipa pago perdiĝu.

(La mesaĝoj sur la retpaĝo de la Hotelo.)

K – Por la Akceptejo.

Mi havas mendon por 2 personoj, en dulita ĉambro, inter la 1-a kaj la 5-a de

junio, por 4 noktoj, kun matenmanĝoj kaj vespermanĝoj. Mi jam pagis la 30 procentojn de la kosto, kiel anticipon. Nun mi interesiĝas, ĝis kiam mi rajtas malmendi la ĉambron, por ke la anticipon mi rericivu.

H – Saluton, Karina!

Pro la malcerteco rilate la pandemion, nia hotelo ŝanĝis la kutimojn de la malmendo. Tiel vi rajtas malmendi vian ĉambron ĝis la 29-a de majo, do, la antaŭan labortagon, se ankoraŭ validos trudizoliĝo en iu ajn formo. Sed ni esperas, ke ni povos jam akcepti vin.

K – Dankon por la informo!

K – Erika, ĉu vi ankoraŭ ĉeestas? La sinjorino en la hotela akceptejo estis tre afabla. Ŝi skribis al mi responde, se en nia lando la homoj ankoraŭ ne

povas laŭplaĉe veturadi, aŭ restadi ie ajn kaj iom ajn, ili redonos al ni la monon, kiun mi jam pagis. Ni havos ankoraŭ tempon decidi, ĉu ni veturu aŭ ne.


E – Ĝis kiam ni devas definitive decidi pri tio?

K – Sufiĉos ĝis la antaŭa vendredo. Ni veturus la postan lundon. Mi esperas, ke ni povos!

E – Jes, estus bone! Mi jam multe atendas tiujn tagojn, post la trimonata deviga restado hejme!

TASKOJ

- Kiel vi, aŭ ĝenerale lernantoj lernis dum la pandemio? Kio restis, kiel antaŭe, kio ŝanĝiĝis? Ĉu vi ŝatas aŭ ne tiajn ŝanĝojn? Rakontu tion, skribe aŭ



buŝe al via lerno-partnero!

- Faru liston de manĝaĵoj kaj purigiloj, bezonataj por vi (aŭ por via familio), por du-semajna periodo!
- Ĉu vi jam butikumis rete? Se jes, rakontu, kiel tio okazis! Se ne, imagu, kion vi povus mendi rete!
- Ĉu vi kutimas sportumi aŭ gimnastiki hejme? Se jes, rakontu, kion kaj kiom ofte vi faras tion. Se ne, imagu, kiujn ekzercojn vi povus fari en via ĉambro!
- Faru dialogon (buŝe, kun via lerno-partnero, aŭ skribe): a.) Vi deziras mendi tranokton (ĉu en hotelo, junulara gastejo, ripozdomo, aŭ tendaro) por 5 noktoj! b.) Interesiĝu, ĉu via mendo estas konfirmita! c.) Ŝanĝu la daton de via jam mendita rezervado! d.) Nuligu (malmendu) vian rezervitan mendon! Ne forgesu pri la precizaj datoj, nombro de personoj, eventualaj manĝoj, ktp!

Vortklarigoj

Pandemio: plur-regiona aŭ eĉ tutmonda disvastiĝo de iu disvastiĝanta malsano, kiu suferigas la homajn populaciojn, ne nur en iu preciza regiono, sed en multaj kontinentoj, aŭ eĉ tutmonde.

Trud-izoliĝo: devo aŭ devigo por apartiĝi je certa distanco de la aliaj, kaj forlasi la loĝlokon nur kaze de nepra bezono. **Salajro:** regule pagata monsumo por laboro. **Koron-viruso:** tre malgranda infekta agento, pseŭdovivajo, kiu reproduktas sin per parazitado je iu viva ĉelo. Ĝi povas reprogrami la ĉelon kaj tiel kaŭzas malsanon, eĉ morton, en la homa korpo. **Skajpo:** reta programo por komunikado. **Matĉo:** sportludo inter du homoj, aŭ du grupoj de homoj. **Pigra:** mallaborema. **Kuŝ-apogo:** gimnastika ekzerco, kiam la ekzercanto, kuŝante surventre, apogante sin sur la manplatoj, levas la korpon tiel, ke nur la manoj kaj la piedoj tenas la korpon. **Ŝnur-saltado:** uzado de salto-ŝnuro. **Salto-ŝnuro:** malpeza ŝnuro, kun manteniloj, uzata de sportistoj, infanoj, dancistoj k.s., por ŝnur-salti. **Rano-saltado:** gimnastika ekzerco, dum kiu ekzercanto el kaŭranta pozicio eksaltas, kaj saltante – rekaŭrante – moviĝas iudirekten. **Ventro-leviĝo:** gimnastika ekzerco, kiam la ekzercanto kuŝante sidiĝas, helpe de la ventraj muskoloj.



El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supran! Nomu la objektojn kaj homojn! – Kie ili estas? Kion ili faras? Kiujn vestaĵojn portas la knabino? Kiujn kolorojn havas la objektoj kaj vestoj? Kio okazas sur la bildo?



Martin Ptasinski

La reĝo de serpentoj



En sudorienta Germanio, en la regionoj Spree-arbaro kaj Luzacio, vivas indiĝena slava popolo: la soraboj – malgranda popolo kun granda kaj abunda mitologio.

La soraboj setlas tie jam ekde la 5-a jarcento, kaj estas kvazaŭ la praloĝantoj de hodiaŭa Germanio. Ĝis nun vivas ĉirkaŭ 60.000 soraboj laŭ la rivero Spree kaj en la montetaro de Luzacio. Ili ĝis hodiaŭ konservis siajn proprajn lingvojn (jes, ekzistas du sorabaj lingvoj!), kulturon, religiejon – kaj mitologion.

Soraboj ofte ŝercas, ke ili estas la plej riĉa popolo de Eŭropo, eĉ de la mondo, ĉar ili estas malgranda popolo, kiu tamen havas du lingvojn (la supra kaj la malsupra soraba), du konfesiojn (katolika kaj protestanta), kaj unu el la plej abundaj popolaj mitologioj de Eŭropo.

En tiu mitologio ekzistas estaĵoj kiel la meztagvirino, kiu kvazaŭ fantomo aperas en la kampoj dum varmegaj tagoj en luzacia somero; la akvoviro, kiu vivas en la senĉesa labirinto de kanaloj kaj riveretoj en la mistika Spree-arbaro; aŭ la hometoj (*lutki*), kiuj estas kvazaŭ soraba versio de nordeŭropaj elfoj; ankaŭ ne forgesante pri la eble plej konata soraba estaĵo: la sorĉoknabo *krabat*. Alia mitologia estaĵo en la Spree-arbaro estas la serpenta reĝo. Hodiaŭ ni volas konatigi vin kun tiu eksterordinara moŝto!

En la soraba mitologio serpentoj estas bonaj, bonkoraj kaj feliĉigaj bestoj. Iam oni eĉ kredis, ke, se en iu domo – ĉu subtegmente, aŭ en ties kelo – vivis unu paro da serpentoj, tiu domo estis bonstata, feliĉa kaj benata de Dio. El tiu estimo por serpentoj radikas la legendo, laŭ kiu tiuj bestoj ankaŭ havas sian propran reĝon –

do la serpentan reĝon. La serpenta reĝo estas rekonebla laŭ blanka, brilanta strio sur sia dorso. Li kutimas renkontiĝi kun aliaj serpentoj de la Spree-arbaro, por komuna ludado en iu senarbejo meze de la arbaro. Iam li ankaŭ havis kronon sur sia kapo, kaj por povi ludi, la serpenta reĝo desurkapigis sian kronon, kaj metis ĝin sur blankan tukon, kuŝantan en la brilanta suno, por ke li ĉiam povu bone vidi ĝin. Se iu volis ŝteli la kronon de la serpenta reĝo, tiam li aŭ ŝi devis nepre ekscii, kie la serpenta reĝo ĝuste ludas kun siaj regatoj. Laŭ la legendo tio sukcesis nur unu fojon en la sudlanda grafo, kiu restadis en la Spree-arbaro kaj eksciis pri la serpenta reĝo. Li serĉis lin, fine trovis – kaj sukcese forŝtelis lian kronon! Ĉiuj serpentoj sekvis la grafon, dum li kvazaŭ frenezulo forrajdis per sia ĉevalo. Fine la grafo kun sia ĉevalo saltis trans foston kaj super altan muron – kaj tio estis tro por la serpentoj. La ŝtelita krono riĉigis la grafon: danke al ĝi li povis eĉ konstrui novan, grandan palacon. Sed li tamen ne forgesis la serpentan reĝon, kies krono ja ebligis tion al li: en la nova emblemo de la grafo ekde tiam aperis ĉiam serpento. Kaj la serpenta reĝo? Nu, li lernis el sia eraro, kaj ekde tiam ne plu surmetas kronon sur sian kapon. Oni ja bonege rekonas lin ankaŭ laŭ la blanka, brilanta strio, kiun li portas sur sia dorso. Kaj li ankoraŭ aktivas en la Spree-arbaro, inter la arboj, senarbejoj kaj kanaloj de Spree-rivero: foje oni povas vidi lin, sunbanante kaj ĝuante la varmecon de la suno, kun sia blanka, brilanta, tuj rekonebla strio sur la dorso.

Supre: emblemo de la Spree-arbara „ĉefurbo“ Bórkowy kun la serpenta reĝo, kaj flago de Soraboj.

Brazila fabelo:

Lertaj klaŭnoj ĝojigas homojn

Kiaj amuzaj estas tiuj artistoj, kiam ili aperas sur la scenejo de la cirko kaj ridigas la infanojn pere de siaj klaŭnaĵoj (pajacaĵoj)!

U nue eniras la tiel nomata Blanka Klaŭno (vidu sube) kun la vizaĝo pentrita de tiu koloro kaj ruĝa buŝego. Li portas belan brilan veston (kostumon), ornamitan per birdflugiloj, brodaĵoj kaj brildisketoj, kaj sur la kapo estas alta paperkonusa ĉapo.

Poste aperas lia kunulo Aŭgusto (vidu apude). Tiu klaŭno vestas sin en diversaj manieroj. Liaj vestoj povus ŝajni elegantaj, se lia streka pantalone ne estus tiel longa, kaj lia kvadrata jako tiel granda. Ankaŭ li havas surkorpe kolorajn flikaĵojn, lamenojn ktp. Nur rigardi lian platan ĉapon kaj grandajn ŝuojn estas kaŭzo de ridegoj.



Desegnisto: Danny D PERERA

Blanka Klaŭno rolas kiel vigla kaj inteligenta, kaj Aŭgusto rolas kiel malsprita klaŭno. Kvankam la blanka estas pli vigla, Aŭgusto ĉiam venkas pro la malbono, kiun Blanka Klaŭno faras al li. Ekzistas ankaŭ klaŭno, kiu nomiĝas Kontraŭaŭgusto (aŭ Trombo). Li ŝatas ĝeni kaj konfuzi sian kunulon, sed ne ĉiam rolas tri klaŭnoj kune. Ĝenerale rolas du: Blanka Klaŭno kaj Aŭgusto.

Tiuj klaŭnoj scias fari multon, ili estas muzikistoj kaj ludas kelkajn muzikilojn, ili estas ĵonglistoj kaj ĵetas pilkon kaj ludringegon aeren. Ili estas ankaŭ akrobatoj kaj marŝas sur ŝnurego. En aliaj cirkoj estas klaŭno, kiu rolas kun dresitaj bestoj (hundo, urso, simio), kiu kapablas fari belegajn kaj emociajn aktoradojn.

La klaŭnoj ekzistis antaŭ longa tempo kaj la plej famkonata de tiuj tempoj estis Histriono. Li amuzis reĝon en lia palaco. Ankaŭ ekzistis alia, kiu rolis en teatroj kaj placoj. Ofte ili estis etuloj, ili havis kostumon de malhelaj koloroj kun ornamaĵoj kaj tintiloj, kaj sur la kapo portis ĉapon, similan al kokokresto.

Ĝojigi personojn estas unu el la plej belaj profesioj, kiuj ekzistas.

Jozefo de Jesús Campos Pacheco



Desegnisto: Danny D PERERA

La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,
ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, malgosia.junaamiko@gmail.com



Kanto akompanas nin ĉie... Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, ebligas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.

Ĝi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, kantante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti, kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugestie alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas fremdan lingvon.

La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.


Dum la pandemia tempo mi proponas al vi ne nur unu, sed du kantojn. Ilin helpis prepari al mi Stano Marček, la ĉefredaktoro de nia revuo *Juna Amiko* kaj jOmO, fama Esperanta kantisto.

Vizitante la paĝaron de Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kiu ĉi-jare okazos interrete <https://www.facebook.com/efekantoj> vi povos aŭskulti la kanton *La jaro de l' viruso* de I.D.C.

Éric Languillat estas la aŭtoro de la teksto kaj de la muziknotoj.

Vizitante la *Aŭskultejon* de Stano Marček <http://t1p.de/auskultejo1>

vi povos aŭskulti la kanton *Reklamo al silento* de la grupo TEAMO, kies manaĝero estis Stano.



La jaro de l' viruso

*Vi geedziĝis sur bela montet'
Vi mondfamiĝis kiel poet'
Kun plej altaj honoroj vi diplomiĝis
Multis ja sukcesoj, sed...*

*Ni nur memoros
Saluti unu la alian tra fenestro
Kaj ni nur parolos pri via viv'
Dum tiu tre stranga trimestr'
Ĉar tio estis dum la jar' de l' viruso.
Vi rapide kuris la maratonon
Malfermis trinkejon, ĝin abandonis
Enfermiĝas ni kiel Harvej Vejnŝtejn'
Sed kun puraj manoj en hejmi'*

*Ni taksis nin saĝaj,
Sed birdoj daŭre flugas en Pariz' kaj Milano
Kaj mi ĉiam volonte pasigis jam
La printempon sen akompan'
Finfine neniu miras pri tiu gusto.*

Éric Languillat (i.d.c.), laŭdevene franco, loĝas kaj koncertas ĉefe en Frankfurto ĉe Majno (Germanio). Li ĉi-jare faras kelkajn koncertojn. Li plej ofte koncertas en, aŭ ĉirkaŭ Frankfurto, sed ankaŭ en multaj lokoj en Esperantujo. Liaj koncertoj inkluzivas sinkronajn videojn. I.D.C. proponas buntan melankolian elektro-popmuzikon, en kiu akustikaj gitaroj dancas kun spicaj drummaŝinoj kaj prasinteziloj el alia jarcento.



Laŭ li “La danĝero en Esperantujo estas ke esperantistoj sufiĉe facile ion ŝatas nur pro tio ke ĝi estas en Esperanto, kaj do mi diras al nova kolego: traktu muzikon Esperantan same kiel muzikon alilingvan.”
 “Muziko povas esti kiel vitroŝranko de Esperanta kulturo.”

[La informoj laŭ la Vikipedio: https://eo.wikipedia.org/wiki/Inicialoj_dc].

La grupo **TEAMO** estas slovakaj pop-rok-muzika grupo. Ĝi fariĝis la plej populara muzika grupo en la tiama Ĉeĥoslovakio. En la jaro 1989 la grupo eldonis la unuan albumon ankaŭ en Esperanto, kaj sekve koncertis dum la 74-a Universala Kongreso de Esperanto en Brajtono, la 62-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda en Illertissen kaj la 45-a Internacia Junulara Kongreso en Kerkrade.

Dum dek jaroj la grupo faris pli ol mil grandajn koncertojn (stadionoj, amfiteatroj...), kiujn organizis ĝia manaĝero, la nuna ĉefredaktoro de *Juna Amiko* Stano Marček. En 1989, 1990 kaj 1991 TEAMO gajnis la plej faman konkurson “Zlatý slávik” (“Ora Najtingalo”). En 1991 la kantisto de la grupo Pavol Habera gajnis la saman premion en la kategorio “kantisto”, superante i. a. la faman Karel Gott. Pri la kanto “Reklamo al silento” en Esperanto estas filmo de Slovaka Televido: <https://www.youtube.com/watch?v=oleJsCURqK8>

Ankaŭ ĉi tie, kun la vortoj, kiel karaoko: <https://www.youtube.com/watch?v=KH7jI0zXSDk>

[La informoj laŭ Vikipedio: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Team>]

Bonvolu redakti kelkajn demandojn laŭ la tekstoj de la rubriko.

Viajn respondojn kaj desegnaĵojn sendu al mi rete ĝis la 30-a de junio 2020, aŭ poŝte al: Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej, ul. Kołłątaja 26A, PL- 50-007 Wrocław, Polska.

Valorajn premiojn fondis pola organizaĵo Eŭropa Centro de Interkultura Edukado www.ecem.com.pl



TEAM': Reklamo al silento

Hmi Fmi Hmi Fmi Hmi Fmi
 Televid' reklamas ja la silenton nun ĉiu jam ekklamas pro
 G A Hmi Fmi Hmi Fmi
 bela oportun'. Al silent' reklamo vera furoraj'
 Hmi Fmi G A Ref: G A
 importita silenteg' plej necesa aj'. Eblas en kaŝ' la si-
 lenton de arbar' havi por via dom'
 G A D G A
 estas garantio, indas la far' akirus ĝin plej ruza
 Hmi Hmi
 hom'. 3 x D.C. al Fine



Renée Triolle

Eleanor Roosevelt

(1884-1961) – prezident-edzino kaj aktivulino por homaj rajtoj

Eleanor naskiĝis en altburga usona familio. Ŝia patrino mortis, kiam ŝi estis nur 8-jara, kaj la patro (drogulo kaj alkoholulo), kiam ŝi estis 10-jara.

Edukis ŝin la avino, kiu en 1898 sendis ŝin al la tre fama lernejo en Londono, pensiono *Allenswood/alensvud*, kiu donis al la lernantinoj scivolemon, emon vojaĝi, instruis fremdajn lingvojn (Eleanor flue parolis la francan) kaj pledis por egalrajteco inter viroj kaj virinoj, tre avangarda temo tiuepoke!

Mem nevino de prezidento de Usono, ŝi edziniĝas al Franklin Delano Roosevelt, kiu estis prezidento de Usono de 1933 ĝis 1945.

Prezident-edzino

Ŝi povus kontentiĝi pri la rolo de ridetanta belulino apud la prezidento, sed ŝi engaĝiĝis en asocioj de virinoj, renkontiĝadis kun virinoj-jurnalistoj, juristoj, sindikatanoj. Ŝi forte subtenis sian edzon, iĝis membro de la demokrata partio kaj antaŭpuŝis temojn, diskutitajn en tiu epoko: subteno al virinoj, al minoritatoj, ĉefe nigruloj; socia egaleco, homaj rajtoj. Oni diris pri ŝi, ke ŝi estis “ministro sen ministrejo”, tiom ŝi zorgis pri malfortuloj. Oni konsideris ŝin “maldekstrulino” eĉ “ruĝulino”, do danĝera homo en mondo, kie regas ĉu komunismo (Sovetunio), ĉu liberalismo (Usono).

Ŝi kreis novan funkcion por la edzino de prezidento, oni nomis ŝin “la unua damo”, titolo uzata nun eĉ en landoj, kie la edzino

de prezidento estas nur edzino, sen aparta rolo. Kiam ŝia edzo iĝis paralizita, ŝi estis “liaj gamboj kaj okuloj”, do ankoraŭ pli enŝoviĝis en la politikon de Usono.

Ŝi redaktis tagan rubrikon *My day* (mia tago), aperintan en 40 gazetoj, aperis en radioelsendoj, turneis por la Nova Arango (*new deal*), proponita de sia edzo, batalis kontraŭ diskriminacio de nigruloj, por akceptigi judajn rifuĝintojn dum kaj post la Dua Mondmilito.

Defendanto de la Homaj Rajtoj


Post la morto de sia edzo ŝi daŭrigis siajn batalojn, pledis por kreado de nova ŝtato Israelo, subtenis nigrulojn kaj virinojn, en la 50-aj jaroj kontraŭis la politikon de senatano Mac Carthy, kiu diskriminacis ĉiujn, kiuj simpatiis kun la politiko de Sovetunio.

Pro sia longa engaĝiĝo pri defendo de egaleco inter ĉiuj homoj, viroj/virinoj, blankuloj/nigruloj, ne mirinde ŝi estis la unua delegito de Usono ĉe Unuiĝintaj Nacioj en 1946. Ŝi ankaŭ prezidis Komisionon pri Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj (1946-1951) kaj reprezentis Usonon ĉe tiu komisiono de UN (1947-1953).

Ne mirinde René Cassin vokis ŝin por eniri la grupon de pensantoj, kiuj donis al la mondo Universalan Deklaracion de la Homaj Rajtoj en 1948, al kiu ŝi multe kontribuis. Ŝiaj citaĵoj: “Faru, kion la koro diktas al vi: ĉiel oni vin kritikos: vi estos damnita se vi faras, damnita se vi ne faros.” “Monda paco ne povas esti laboro de unu sola homo, unu sola partio, unu sola nacio. Tiu paco kuŝas sur komuna volo de la tuta mondo”.



Pli bona pano sen butero ol dolĉa kuko sen libero



La rubrikon prizorgas **Mónika Molnár**

Estas interese, ke antaŭ la ferioj la tagoj ĉiam pli malrapide pasas, sed dum la ferioj „hip-hop-vrummm...!” kaj ili rapidege estas jam for.

Stranga fenomeno, sed certe ĉiuj travivis jam ĝin foje (aŭ plurfoje) en sia vivo. Ulideto kaj la aliaj ulidoj estis konvinkitaj, ke iu certe manipulas la tempon; alimaniere tio ne eblus. Kaj tamen tio okazas! Jes ja, ĝi ekzistas! La tiom atenditaj vintraj ferioj finfine alvenis. La amiko de Ulideto ĝoje pasigis tiujn tagojn kun niaj ulidoj. Ili multe ludis, amuziĝis, sportis kaj ridis. Estis magiaj tagoj. Sed, kiel dirite, ili multe tro rapide forflugis... Kaj jen, denove lernejo. – Ho, ne! – veis Plendemulido. – Morgaŭ ni devos denove iri en la lernejon... Mi multe pli ĝojus resti hejme kaj daŭrigi la feriadon! Mi ne ŝatas frue vekigi!

– Ne ploraĉu, – diris Konsolemulido
– Ĉio malbona finiĝos iam!
– Ho, infanoj, – grumbletis Avinjo – vi eĉ ne konscias pri la ŝanco, kiun vi havas.
– Kiu ŝanco, Avinjo? Ĉu iri en la lernejon? Ĉu vi ne komprenas nin? Ĉu...?
– Jes, imagu, ke multaj infanoj ne rajtas iri en la lernejon, ne rajtas lerni, kvankam ili ŝategus. En bela, harmonia mondo ĉiu infano devus havi tiun ŝancon! Jes, jes, kedu min, ke tio estas rajto kaj ŝanco samtempe, sed bedaŭrinde ne ĉie estas tiel!
La ulidoj ne nepre konsentis kun Avinjo, sed ili ne volis disputi kun ŝi, ĉar ili tre amis ŝin. Do, ili simple silente grumbletis plu. Imagu, se en tiu momento iu dirintus al ili, ke post du monatoj ili mem petegos la gepatrojn povi reiri en la lernejon, ili ridegintus kaj neniam kredintus. En tiu momento neniu, eĉ ne Avinjo supozis, ke venos eteta viruso, kiu... Kiel en la rakonto de Nathan Chidlow [‘naton ŝidlo’]...









<p>Nathan Chidlow: La kvaranteno de la katoj</p>	<p>Jen la historio de la kato, kiu estis en kvaranteno dum longa tempo por ne infektiĝi je katonaviruso.</p>	<p>Li ne rajtis iri ĉasi kaj manĝis multege da krakmanĝaĵoj „PopKrok” dum li spektis la televidilon 10 horojn tage...</p>

<p>Tamen, jam post la tria tago li ne plu volis vidi la televidilon. Li vere, vere volis iri eksteren. – Miaŭ, mi volas iri eksteren!</p>	<p>Kaj li manĝis ĉiam la samtipan manĝaĵon. Ĉiam. Tiom longe, ke li ekrevis manĝi denove musetojn.</p>	<p>Nur la penso pri la ekstera vivo pli kaj pli fortigis lian volon iri eksteren. Li jam eĉ malfermis la pordon, sed... – Ne, mi ne povas fari tion!</p>
		<p>Do, kiel ni ja diris, en tiu momento, kiam la ulidoj plendegis pro la rekomenciĝonta lernejo, neniu, eĉ ne Avinjo supozis, ke venos eteta viruso, kiu renversos la kutiman ordon, la ĉiutagajn kutimojn, rutinojn de la homoj ĉie en la mondo. Sed ĝi venis! Kaj ĝi ĉion influis. Nenio estis poste tiel, kiel antaŭe. Kaj Avinjo, tiu kara Avinjo denove pravis, kiel tiom oftege.</p>
<p>Post du longaj monatoj finfine alvenis la tago, kiam oni denove rajtis iri eksteren. Do, la kato kuregis al la pordo por eliri...</p>	<p>... kaj kiam li malfermis la pordon, li tuj vidis, ke ekstere pluvas... – Nu, finfine mi ne tiom multe volas iri eksteren... pluvas...</p>	

La ulidoj devis resti hejme. Ne nur simple ne estis devigataj iri en la lernejon, sed estis klare malpermesite iri tien. La unuaj reagoj de la infanoj estis ĝojkrioj kaj entuziasmaj planadoj, kion ili faros hejme. Komence la situacio ne estis malplaĉa al la plimulto de la ulidoj. Ili ludis, ridis, amuziĝis. Post iom da tempo ili volis iri al siaj amikoj, sed... ne eblis! Ili volis iri aĉetumi, sed... ne eblis! Ili volis iri en la kinejon, al koncerto, ien ajn, sed... ne eblis! Jam post semajno ili alvenis al la deziro voli reiri almenaŭ en la lernejon, sed... ne eblis! Kaj multo ne eblis. Kaj ankaŭ iri al multaj plaĉaj, planitaj eventoj ne eblis... Neniu plu ĝojegis pro la „rajto ne iri lernejen”. Bonŝance la kara, bona, ĉionsolva Avinjo estis kun ili. Ŝi per sia multsperta saĝo gvidis la ulidojn por ke ili sukcesu forlasi siajn ĉagrenojn, ke ili povu vidi ankaŭ pozitivajn flankojn de la situacio kaj povu ankaŭ bone profiti el ĝi. Komenciĝis eĉ grandegaj planadoj!





 <p>La Astronaŭto</p>		
<p>Numa Schmucki [ˈnuma ŝmuki]: La astronaŭto</p>	<p>Estis foje astronaŭto, kiu volis organizi la Esperantan kongreson sur la Luno kaj ankaŭ sur aliaj planedoj.</p>	<p>Li rakontis tiun ideon al siaj amikoj kaj demandis, kion ili pensas pri tio. Ili diris, ke estus tro malfacile.</p>
		
<p>Do, li iris ĉe Mireille Grosjean kaj Stano Marček kaj demandis ilin: – Ĉu vi volas helpi min organizi Esperantan kongreson sur la Luno? – Jes! – diris ambaŭ.</p>	<p>Ili kune iris al NASA kaj demandis, ĉu ili povus lupreni rakedon de la instituto. La respondeculo de NASA diris: – Jes, ni volonte helpos vin.</p>	<p>Ili multe pripensis, kiuj estas la plej necesaj aferoj por tiu eksterordinara aventuro. Ili enpakis la tutan ekipaĵon kaj ekiris en la kosmon.</p>
		<p>Avinjo ĉiam trovis la plej konvenan rakonteton por ĝojigi, trankviligi, entuziasmigi la ulidojn. Ŝi ĉiam sciis kiel agi, kiun historieton elekti. Kiam ŝi finis laŭtlegi la eksterordinaran rakonton de Numa, la ulidoj mem estis plenaj je entuziasmo kaj nekredablaj ideoj. Kaj la tempon por ties realigo, ili ja havis kaj sukcesis aprezi ĝin laŭ ĝia ĝusta valoro, kaj ili sciis, ke ĉio malbona finiĝos iam.</p> 
<p>Ili surteriĝis... ho, ne! Ili surluniĝis kaj tuj komencis la grandan konstruadon.</p>	<p>Tri monatojn poste ĉio estis preta por la unua esperanta kongreso sur la Luno!</p>	

Virtuala Konferenco de ILEI

Ni povas anonci al vi, ke ILEI lanĉos la 53-an Virtualan Esperanto-Konferencon ILEI kun nomo VEKI, en la semajno de la 25-a ĝis la 31-a de julio 2020.

Do provu trovi agrablan lokon kun bona retkonekto, komfortan seĝon, iom da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj; dum sep tagoj okazos prelegoj, debatoj, babiladoj, jogaj kursoj, koncertoj kaj aliaj eventoj, per reta konekto, kiu ebligas diskutojn kaj intervenojn. La programo aperos post diversaj esploroj survojoj. Estas ankaŭ senprogramaj paŭzoj, kiuj povos servi por koridoraj babiladoj, ĉar ni havos la retkanalon 24 horojn tage, dum sep tagoj. Regule la estraro de ILEI eldonos anoncojn en ĉi tiu retejo: www.ilei.info. Bonvolu viziti ĝin. Tie jam aperas programskizo de la unua de majo.

Ni petas vin eviti okazigon de aliaj retaj eventoj dum tiuj sep tagoj!

PROGRAMSKIZO de la 53-a Virtuala Esperanto-Konferenco ILEI (VEKI) 25-31 julio 2020
7 tagoj – 7 temoj – ĉiu tago havos sian temon.

1. Solena inaŭguro, prelegoj pri la kongresa temo. Planeda pripenco.
2. Pripensoj pri strukturo. Komitato.
3. Prelegoj pri lingvoj. Lingva festivalo.
4. Prelegoj pri interlingvistiko kaj Esperanto en universitatoj.
5. Mastrumado de la Ligo. IPR¹, JA². Vivo de ILEI, demandoj kaj respondoj. Gastronomia rondo.

6. Pedagogiaj temoj. Instruspertoj.
7. AMO-seminario. Internaciaj agadoj, internaciaj institucioj / Konkludo.

La azia tagiĝo komenciĝos per tridekminuta japana joko-kurso, kiun Mirejo donos.

Ĉiu tago havas sian temon kaj tri sesiojn; la tago kongruas kun la tago en UTC (UTK³)+2 (Afriko, Eŭropo).

Inter la aktivaĵoj verdaĵ sur la tempo-plano, la kanalo estos libera por koridoraj babiladoj, kiel en kongreso. Sen ia gvidado.

Anstataŭ Nacia Vespero ni havos **Planedan Pripenson**.

La kutima frandvespero, kiu kutime malfermas la kunvenon de ILEI, havos taŭgan nomon: **gastronomia rondo**: filmu iun tipe tradician manĝon, ĉe vi kun familianoj aŭ geamikoj, kaj sendu ĝin al ILEI. Maksimuma daŭro: 3 – 5 minutoj. Nepre komencu dirante vian nomon, urbon kaj landon. Montru kaj nomu la manĝaĵon en via lingvo kaj en Esperanto, la manĝmanieron, komentu la manĝaĵojn, originon de ili, kuirmanieron... – en kiu okazo oni manĝas tion. Ni havos dum VEKI sesion, kie tiuj filmetoj sekvos unu la alian. Sendu ilin al Elena Nadikova, uzante ilei.sekretario@gmail.com.

Koncertoj, deklamadoj: ni alvokas al artistoj, petante, ke ili sendu filmeton kun hejma koncerto por ILEI ĝis la 30-a de junio. Daŭro: inter 30 minutoj kaj unu horo. Ni deziras havi en ĉiu sesio la lastan horon kun koncerto. Tio estas, ke ni devus akiri 30 kontribuojn. Ankaŭ povos esti koncertoj en rekta enreta partopreno; por tio iu artisto aŭ artista grupo povas skribi al ilei.prezidanto@gmail.com, dirante: mi pretas ludi en tiu tago je tiu horo! Bonvenon! Pro tio ni ne havos Internacian Vesperon, ĉar ni ne vesperumos samtempe!

La teknika aspekto: La konferenco akiros kanalon, alireblan per numero kaj pasvorto, kiun ni vaste komunikos antaŭe per nia retejo www.ilei.info.

1) Internacia Pedagogia Revuo
2) Juna Amiko

3) Universala Tempo Kunordigita



Tempoplano																							
UTC+2		NL	CH	de ES ĝis DE																			
01	02	03	04	05	06	07	08	09	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	00
Kalifornia sunsubiro						ĉefplado						Azia tagiĝo											
UTC + 9		JP	KR																				
08	09	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	00	01	02	03	04	05	06	07
UTC - 8		USA okcidento																					
14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	00	01	02	03	04	05	06	07	08	09	10	11	12	13

Blua koloro = ripozo, dormo Verda koloro = aktivajtoj

Komenco: sabate la 25-an de julio, ĉefplado 15 :00 UTC* + 2: Solena inaŭguro.

Fino: vendrede la 31-an de julio, azia tagiĝo, 00 :00 UTC + 2: Konkludo, adiaŭo.

Ni provos eldoni Konferencan Libron kun resumoj de la prezentaĵoj, filmoj, debatoj, decidoj. Ni faros magran eldonkvanton,

(*UTC = UTK; *Universala Tempo Kunordigita*)

ILEI alvokas al la abonantoj de *Juna Amiko*

Karaj geamikoj de *Juna Amiko*!

Vi amas nian revuon, vi legas ĝin, eble vi uzas ĝin dum via instruado de Esperanto. Bonege! Ni dankas al vi pro tiu subteno. Ni deziras scii, kiom da legantoj uzas la revuon en sia instruado. Do rapide kaj mallonge informu nin.

Mi ne povas skribi pri nia revuo sen mencii la elstaran laboron de la rubrikestroj kaj la kunlaborantoj, kompreneble ankaŭ de la redaktoro Stano Marcek. Ili regule nutras la revuon per interesaj kontribuoj. Plie dankoj iru al la provlegantoj, kiuj zorgas pri senerara eldonado.

Vi memoras eble pri la pasinteco. Antaŭ ne multaj jaroj la revuo aperis trifoje jare. Poste ni iris al kvar eldonoj. Antaŭ du jaroj ni eldonis ĝin plenkolora, kaj tio tre plaĉis kaj restis, tamen kun pliaj kostoj.

tamen ni bezonas kelkajn ekzemplerojn por la bibliotekoj. Pro tio ILEI alvokas al donacoj por kovri tiujn kostojn kaj por kovri la kostojn de la reta platformo.

La partopreno estos senpaga.

Konstanta informfluo okazas en la ĉefpaĝo de ILEI www.ilei.info.

2020-05-01 Mireille Grosjean

Unu maniero atingi ekvilibron en niaj financoj estas altigi niajn enspezojn: ni akiru pli da membroj, ni akiru pli da abonantoj por *Juna Amiko*. Ĉiuj povas, devas provi kaj klopodi al tio.

Nun ni devas konstati, ke la Ligo devas malpli elspezi, tuj. Do la estraro estas en esploro pri taŭgaj kaj akcepteblaj solvoj. Aŭdiĝas strategio, kiu povus esti adekvata. Jen: la kvara numero de *Juna Amiko* 2020, la decembra numero, aperu nur rete. Tiel ni ŝparus printadon kaj sendokostojn. Nun ni petas vin helpi al la Ligo, akceptante tiun farmanieron. Se vi nepre volas ricevi paperan numeron, bonvolu skribi al [ilei.officejo@googlemail.com](mailto:officejo@googlemail.com). Vi ricevos ĝin.

Se vi nenion faras kaj nenion skribas, vi ricevos en 2020 tri numerojn sur papero kaj la lastan numeron vi ricevos rete, kaj ni elkore dankos al vi.

Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI

Maoria legendo Rona kaj la Luno

La maljuna avino vokis al siaj multajn genepojn. La hela lumo de la plena luno brilis en la okuloj de la malgrandaj vizaĝoj.

Ili ĉirkaŭis ŝin scivoleme kaj demandis “Kio estas, avineto?”. “Sidu trankvile, infanoj,” ŝi diris, “kaj aŭskultu.

Jen la plena luno, kiu brilas tiel hela kaj bela ĉi tiun nokton.”

“Mi rakontos al vi la rakonton de ‘Rona kaj la Luno.’”

“Antaŭlonge, en tempo de niaj prauloj, vivis Rona, belega junulino. Ĉiuj amis ŝin, sed ŝi estis kolerema kaj kelkfoje parolis malafable aŭ malsaĝe.”

Iam nokte, Rona devis eliri por alporti akvon el la rivereto. Ŝi ne volis eliri de la loĝejo, malproksime en la malhela nokto, kaj koleretis. Tamen ŝi nebonevole ekprenis akvuojn, kaj ekmarŝis laŭlonge de la vojeto. La luno estis plena, sed estis multaj nuboj en la ĉielo. La luno lumigis sufiĉe la vojeton, kaj ŝi baldaŭ alvenis al la rivereto. Tie ŝi plenigis sian akvuojn, kaj ekrevenis rapide laŭ la vojeto. Subite mallumiĝis, kiam la luno kaŝiĝis malantaŭ la nubojn. Rona ne povis vidi ion, nek la vojeton, nek la arbaron, nek la rivereton. Ŝi marŝis malfacile plu, sed ŝi batis sian piedon kontraŭ ŝtonoj, kiuj elstaris de la tero. Ŝi falis, ŝi faligis la akvuojn, tute elverŝigis la akvo. Rona koleriĝis kaj turnis sian vizaĝon al la luno. Sentime kaj malagrabla ŝi kulpigis la lunon pri sia malfeliĉo kaj doloro. Ŝi reprenis kolere la akvuojn kaj turnis sin ankoraŭ al la hejmovoyo. Sed la luno aŭdis ŝiajn insultojn, kaj koleris. “Rona, se vi estus justa, vi ne kulpigus min pri via malfeliĉo. Mi ne igas vian koleremon, mi ne estas kulpa, ke vi marŝis tiel malfrue, ke vi malzorge faletis en la malluma

arbaro kaj dolorigis vian piedon”. Rona sentis doloron kaj malplezuron kaj eĉ pli koleriĝis. Malŝataj kaj malkontentegaj estis la vortoj, kiujn ŝi preskaŭ neaŭdeble ĵetis al la luno. La luno aŭdis tion kaj iĝis kolerega. Ĝi decidis puni la virinon. Ĝi ektiris Ronan kaj ŝian akvuojn al si. Rona penadis kaj kontraŭbatalis. Freneze ekkaptis ŝi arbon por resti surtere. Sed la luno estis pli forta, kaj tiris Ronan, ŝian akvuojn kaj la arbon, supren en la ĉielon. Rona restas ĝis hodiaŭ en la luno. Ŝi bedaŭregis siajn kolerajn vortojn. Sed la luno estis afabla al ŝi, tiel ke post iom da tempo, ŝi enamiĝis al la luno. Ĝi donacis al ŝi belan mantelon kun steloj, kaj la regpovon super la akvoj de la Tero. Ŝi regas la marojn. Oni diras, ke kiam ŝi renversas sian akvuojn, pluvas.”

“Nu, infanoj, rigardu nun la plenlunon. Ĉu vi ne vidas tie Ronan kun ŝia akvujo kaj la arbo? Rigardu, infanoj, kaj zorge min aŭskultu. Ne estu kiel Rona, kiu kulpigis aliajn pri sia malfeliĉo. Kiam vi koleriĝos, pensu pri Rona. Estu kontenta, kiam vin ĉirkaŭas malfacilaĵoj, kaj ŝanĝu vian koleron al respekto por ĉiuj.”

Craig Williams el Nov-Zelando





Legu kaj ĝuu

Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,
ul. Kilińskiego 14/3,
PL-59-300 Lubin,
Pollando, rete:
malgosia.
junaamiko@gmail.com



Legado dum la pandemia periodo...

Preparante la rubrikon por la pasinta numero de *Juna Amiko* mi ne pensis, ke baldaŭ alvenos tiuj kruelaj tempoj.

La koronavirusa pandemio malliberigis nin hejme kaj malbriligis nian ĝisnunan vivon... El preskaŭ ĉiuj anguloj de la mondo ni aŭskultas nur malĝojajn informojn. Ili ne tre bone influas nian sanon. Provu trovi dum la tago kelkajn momentojn nur por vi mem, forgesante pri la nuna kruela mondo, kaj transloĝigu en la mondon de libroj. Por faciligi al vi serĉadon de interesaj, amuzaj kaj utilaj tekstoj, mi preparis ĉi-numere eĉ tri proponojn. Inter ili estas ankaŭ sonlibroj aŭ aŭdo-libroj.

Tamen, unue mi deziras rememorigi al vi, ke aprile, kiel ĉiujare, ni festis Mondan Tagon de la Libro kaj Aŭtoraj Rajtoj. Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo, en 1995, elektis la 23-an de aprilo kiel la tagon de libro, legado kaj kulturo de skribita vorto. Oni elektis ĝuste tiun tagon, ĉar la 23-an de aprilo en la jaro 1616 forpasis Vilhelmo Ŝekspiro kaj Cervanto.

Ĉiun jaron Unesko elektas Tutmondan Ĉefurbon de la Libro. La titolon ricevas la urbo, kiu plenumas specialajn kondiĉojn, kaj do ĝiaj programoj instigas legi librojn kaj eldoni ilin. Ĉi tiun titolon la elektita urbo portas ekde la 23-a de aprilo ĝis la 22-a de aprilo de la sekva jaro. En la jaro 2020 Tutmonda Ĉefurbo de la Libro estas Kuala-Lumpuro en Malajzio.

Memoru, ke niaj pensoj havas gigantan forton. Ili kreas nian realecon. Tial legu pozitivajn librojn, rigardu pozitive la mondon kaj ĉirkaŭigu per pozitivaj kvaranteno, sidante hejme, aŭ limigante niajn kutimojn, sed ni devas fari tion por nia sano, kaj ankaŭ por la sano de aliuloj. Tamen, ni memoru, ke la kvarenteno ne estas "koronferio"... ☺ - Tial legu aŭ aŭskultu utilajn tekstojn.

Klubo de bona libro

Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas danke al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn, kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco.

La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo, bonvolu sendi al la apuda adreso, aldonante la noton:

Biblioteko de
Juna Amiko.

Legu, legu, legu!



Rekomendo

Por Biblioteko de *Juna Amiko* sian rekomendon sendis al ni la kuba esperantisto kaj longdaŭra kunlaboranto de nia revuo José de Jesús Campos Pacheco. Li rekomendas libroforme la sovetian serion de mallongaj aventuroj de *Lupo kaj Leporo* "Mi donos al vi lecionon" (originale: Ну, погоди!).

Tiu serio estis ege populara en multaj landoj. Ĝi rakontas pri aventuroj de Lupo, kiu provas kapti kaj manĝi Leporon. Ili dum tiu postkurado travivas multajn amuzajn aventurojn. Leporo ĉiam sukcesas.

Lupo estas prezentata kiel ruza huligano, vandalo, kiu detruas muzeajn ekspoziciojn, rompas leĝojn kaj ofendas malfortulojn. Li elpensas multajn eblecojn por kapti Leporon, sed feliĉe li ĉiam fiaskas. Lupo ŝatas ludi gitaron kaj kanti, sed li ne scipovas bone veturigi aŭton aŭ motorciklon. Li ĉiam estas mode vestita, fumanta, kaj posedas multekostajn (por tiu tempo) aĵojn. Ne estas ekzemplo por imiti.

Leporo estas prezentata kiel pli saĝa kaj inventema, sed ankaŭ pli malforta. Li glitkuras, kantas kantojn kaj eĉ rolas en la scenejo. Li ĉiam devas forkuri kaj kaŝi sin kontraŭ Lupo, sed foje li savas la Lupon.

Kial Lupo postkuras la Leporon? Kion faris Leporo, ke li devas konstante forkuri? Vi ekscios, legante la serion (aŭ spektante filmojn).


Krom Lupo kaj Leporo estas ankaŭ aliaj bestoj kiel hipopotamo, kato, ursoj, hundoj, kaproj, kastoroj, elefantoj, kangurooj, porkoj ktp. Homoj ne estas. Iliajn rolojn ludas bestoj, kreante bestan mondon.

Tiu amuza serio aperis unue kiel bonhumorigaj filmetoj en la jaroj 1969-1986 en la filmstudio *Sojuzmultfilm* en Moskvo. Poste, en la jaroj 1993-1994 kaj 2005-2006 oni alfilmis kelkajn partojn. Entute estas 20 filmoj. La kreintoj de la serio kaj ĝiaj herooj estis kelkaj aŭtoroj. La scenaron skribis Feliks Kamov, Aleksandr Kurljandskij kaj Arkadij Hajt. La reĝisoro ĝis la jaro 1993 estis Vjaĉeslav Mihajloviĉ Kotjonoĉkin (ruse: Вячеслав Михайлович Котёночкин). La du lastajn filmojn faris lia filo Aleksej Kotjonoĉkin.

Ĉiujare aperis 1-2 novaj filmetoj kaj ĉiuj infanoj atendis ilin kiel la plej ŝatatan donacon. En la serio sonis tre famaj kantoj kaj melodioj de tiu tempo. La serio estis tradukita en kelkajn lingvojn, kaj poste aperis libroforme ankaŭ en kelkaj lingvoj.

Certe ne estos facile trovi tiun serion libroforme, sed provu. Tiun serion certe legos kun plezuro ĉefe plenkreskuloj kaj pliaĝuloj, kaj junuloj, por ekkoni kion legis iliaj gepatroj kaj geavoj. Estos do okazo por viziti bibliotekojn kaj ĉeokaze trovi ankaŭ aliajn interesajn librojn.

La filmstudio *Sojuzmultfilm* informis, ke okaze de la kvindekjariĝo de *Lupo kaj Leporo* estos alfilmita nova serio de aventuroj de tiuj du herooj.






Dum tiuj malfeliĉaj tempoj kaj deviga izolado mi rekomendas viziti la retejon de Luiza Carol kaj **Aŭskultejon** de Stano Marĉek, por viziti la mondon pli sekuran kaj vere favoran kaj amikan por ni.

Luiza Carol preparis novan libron por eldoni ĝin paperforme, sed la nuna tempo malebligis plenumi tiun revon. Ŝi do decidis elekti alian rimedon de kontakto kun legantoj. Ŝi ebligas senpage legi (ankaŭ per saĝtelefono) la libron per la ligilo <http://verkoj.com/verkistoj/luiza-carol/>. Vizitante ŝian paĝaron vi povos ankaŭ trailigi aliajn rakontojn, poemojn aŭ kantojn...

La plej freŝa libro de Luiza Carol, konata esperantistino, verkistino, poetino kaj longdaŭra kunlaborantino de la revuo *Juna Amiko*, nomiĝas "Aliaj pordoj malfermiĝas". Ĝi estas kolekto de rakontoj, kiu estas adresata al gejunuloj kaj al ĉiuj, kiuj deziras konservi en sia koro la entuziasmon kaj la esperemon de sia juneco. Du trionoj el la rakontoj (laŭ paĝonombro, pli ol du trionoj el la libro) temas pri aliplanedanoj kaj pri ties imaga mondo.

Luiza entute verkis la rakontojn por instigi revadon pri pli kontentiga mondo. Ŝi skribis la rakontojn supozante, ke tia revado estas la unua paŝo por realigi la mondon pli justan, amikeman kaj



belan. La rakonto "La naŭ instruistinoj el Parnaso" estas omaĝo al ĉiuj instruistoj de la mondo.



Luiza Carol en ĉiuj siaj beletraĵoj instigas nin, ke ni kreu nian mondon belega, fabela, mistera, kaj tial legante ŝian novan libron ni por momento forgesos pri nia nuna kruela mondo, sed troviĝos en belega mondo, kiu certe revenos al ni...

Ŝi skribas tion, kion ŝi mem bezonas, kion sentas ŝia koro. En sia unua rakonto de la rekomendita libro, kiu havas la saman titolon kiel la libro "Aliaj pordoj malfermiĝas", ŝi priskribas imagan virtualan koruson de infanoj el la tuta mondo. La rakonto "Reva kaj la sonĝa mondo" hazarde temas ĝuste pri terura epidemio... Malgraŭ tio, ke ĉi tiu rakonto estas iom tro longa kaj verŝajne ne sufiĉe gaja por tiu ĉi tempo, valoras trailigi ĝin... Tiun rakonton la aŭtorino verkis antaŭ du jaroj, supozante, ke la homaro jam preterpasis la periodon, kiam grandaj epidemioj povis okazi... Bedaŭrinde, ĝi subite fariĝis aktuala ..

Stano Marĉek, fama esperantisto, la ĉefredaktoro de nia revuo *Juna Amiko*, kunlabore kun Germana Esperanto-Biblioteko en la urbo Aalen, kreis interretan "Aŭskultejon". En ĝi vi povas aŭskulti kaj libere elŭsti sonlibrojn kun fabeloj, poezio kaj prozo, kaj ankaŭ kantojn en Esperanto.



Teksto: Luiza CAROL
Bildaranĝo: Liette LÉla



Sonlibroj aŭ aŭdo-libroj estas tre popularaj en la mondo. Ilin ŝatas aŭskulti ne nur infanoj aŭ junuloj, sed ankaŭ pliaĝuloj. Stano, preparante la sonmaterialojn, al la registrita homa voĉo aldonis ankaŭ muzikon, diversajn sonojn kaj kantojn. Ekstis profesie preparita granda kolekto de Esperantaj registraĵoj.

Stano Marĉek donacas al esperantistoj sonlibrojn kaj kantojn, kiujn li antaŭe eldonis sur kompaktaĵoj kaj kasedoj, aŭ kiujn li helpis eldoni al aliaj eldonejoj. Sume pli ol 30 horoj! ☺

La nova Aŭskultejo estas atingebla ĉe la interreta adreso: 1p.de/auskultejo1 (aŭ <http://stano-auskultejo.bplaced.net/index.htm>). Danke al tiu bela donaco vi povas partopreni en la lingvo Esperanto.


Aŭskultante kaj komprenante parolatan tekston, lernante novajn vortojn, oni fiksis al si modelan elparolon, belajn kaj modelajn vortturnojn el popularaj libroj aŭ kantoj, el la agrablaj mondo de fabeloj, rakontoj, poezio aŭ muziko. Tio estas ankaŭ la pedagogia valoro de la sonlibroj. En la nova Aŭskultejo vi trovos la popularan rakonton de Aleksander

Text about the TEAMO group and a list of songs. Includes a table with columns for year, song title, and album.

Advertisement for 'esperanto' magazine and 'Rokmuzika grupo TEAMO' featuring a photo of the band.



Puŝkin *La Neĝa blovado*, la librojn *La Stranga Butiko* kaj *Verdkata Testamento* de Raymond Schwartz, *FabeLOJ de la fratoj Grimm* (Feliĉa Joĉjo, Haĉjo kaj Grenjo, *La sep kapridoj*, *Reĝo rano kaj fera Henriko*, *Fiŝkaptisto kaj lia edzino*, *La ora birdo*, *Neĝulino*...), *FabeLOJ de Andersen* (*Malgranda Niko kaj granda Niko*, *Reĝidino sur pizo*, *Elinjo-Fingreto*, *Malbela anasido*, *Abio*, *Neĝa Reĝino*...), *Kantoj por kursoj* (*Kukolo*, *Iris knabineto*, *Mariŝa*...), *Ora Team'* (*Team en Esperanto: Reklamo al silento*, *Jen mia numero*, *Via eta timo*, *Letero de Vincento*, *Sur la sama ŝipo*...), *Kantoj de l' popolo* (slovakaj popolkantoj en Esperanto: *Sidu, suno, sidu*, *Flugu falko*, *Amo dia amo*, *Violono acera*, *Mia lando ĉarma*...). - Legu, aŭskultu kaj ĝuu, forgesante pri malfacilaĵoj, kiujn kaŭzas la koronviroza epidemio.





Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo

Konkurso ne nur por junaj legantoj.

Rubrikestro: Małgosia Komarnicka.

**Ĉi-numere mi proponas viziti
nepriskribeblan landon, kiun vi
ne trovos sur niaj mapoj...**

Ĝi estas en niaj koroj, pensoj kaj mensoj. Kial mi invitas vin al ĝi? De kelkaj monatoj la tuta mondo batalas kun terura viruso. Tio ege ŝanĝis nian vivon, senkonsidere kie ni loĝas kaj kiuj ni estas. Ofte ni jam konsideras: Kio okazos poste? Kia estos nia mondo? Kiaj ni estos? Ĉu ni sukcesos krei novan, pli belan mondon? Ĉu vere ni povas ĝin krei en niaj koroj kaj pensoj, vidante ĉiutage malĝojon kaj ploron? Ĉu ni sukcesos krei nian Ĝojlandon, sekuran, amikan kaj belegan? JES! Ni povas krei tiun mondon! Tralegu, speciale atingeblegitan por vi, karaj legantoj de *Juna Amiko*, rakonton **Ĝojlando** de Luiza Carol.

Ĝi estis speciale skribita por la legantoj de *Juna Amiko*, kaj rakontas veran historion, kiun travivis la aŭtorino. La urbo, en kiu ŝi tiam loĝis, estis bombardita. Kiam dum tiuj teruraj tempoj ŝi provis pensi pri io trankviliga, aperadis sonĝo pri la Ĝojlando, kiun ŝi jam tenas ĉiam en sia koro. Tio helpis al ŝi travivi ĉiujn malagrablojn. Vi ankaŭ povas fari la samon kaj krei propran belan Ĝojlandon.

Kio allogas min en Ĝojlandon?

Ĝojlando. – Mi ja scias, kie mi troviĝis. Mi rekonis la landon, la konstruaĵon kaj la ĉambron. Mi rekonis ĉiujn ĉeestantojn. Mi estis tiom feliĉa troviĝi denove tie, ke mi eĉ ne demandis min, kiamaniere mi alvenis



ĝuste tien... ..Mi retroviĝis en Rumanio, en la jaro 1954. Mi estis en mia tiama lernejo de Bukareŝto, en la klasĉambro de la unua lernejo. Apud mi, ĉe la samaj malnovaj skribotabloj, estis miaj tiama kolegoj. Ni ĉiuj estis ĉirkaŭ 7-jaraĝaj knabinoj, proksimiĝantaj al la fino de la unua lernejo. Fronte de ni estis nia juna instruistino, la plej bela, saĝa kaj bonkora estaĵo, kiun mi renkontis en mia ĝistiam viva. Mi pensis, ke eble ŝi estas feino... aŭ anĝelo... aŭ aliplanedano...

Ŝi havis la kapablon forpreni nin al pli belaj mondoj, promenigi nin tra fabelaj landoj, kie la homoj estis pli honestaj, kuraĝaj kaj bonaj, ol ni kutimis renkonti... Dum ŝia ĉeesto, ni mem estis aliformiĝantaj portempe en knabinojn pli saĝajn kaj bonkorajn, ĉar ni amegis ŝin kaj volis similaj al ŝi...

Jes, mi ja troviĝis en tiu loko kaj en tiu jaro, sed la aero estis iomete sorĉa, iom verdeca, odoranta je abio. Mi bone konsciis, ke mi travivas iun portempan sorĉon, kaj mi bedaŭros kiam ĝi finiĝos. Mi pensis, ke mi devas ĝui ĉiun momenton kaj klopodi rememori ĉion, post kiam la sorĉo finiĝos...

Ŝi diris: – Knabinoj, hodiaŭ ni kune kreas fabelon pri Ĝojlando. Estu ĝi la plej agrabla kaj gaja lando, kiun ni povos imagi! Ĉiuj infanoj estu tie feliĉaj...

Tiam, en 1954, malpli ol 10 jarojn post la Dua Mondmilito, multaj infanoj estis orfaj, multaj apenaŭ havis sufiĉe da manĝaĵo aŭ da vestaĵoj... En multaj familioj la viroj kutimis ebriiĝi kaj bati siajn edzinojn kaj infanojn... Ekzistis infanoj, devigataj almozi aŭ eĉ ŝteli... En nia klaso troviĝis knabinoj, kiuj apartenis al 4 etnoj, kaj la intertnaj konfliktoj ankoraŭ ne estingiĝis post la fia milito... Niaj vivoj ne



estis tre gajaj... Kaj jen, subite, 50 knabinetoj el tre diversaj familioj rigardis fascine sian instruistinon, kiu proponis... vojaĝon al Ĝojlando! Jes, jes, jes! Ek al Ĝojlando!!!

- Mi volas, ke neniu plenkreskulo batu infanojn!
- Mi volas, ke en ĉiu domo estu funkcia hejtigilo!
- En Ĝojlando, ĉiu domo havu banĉambron kun duŝilo!
- Mi volas, ke ĉiu infano ricevu po unu paro da ŝuoj ĉiujare!
- ... kaj ankaŭ palton kun kapuĉo!
- Ĉiu infano povu manĝi trifoje tage!
- Neniu infano estu orfa!
- Jes! Do, militoj ne plu ekzistu!
- Malamo ne plu ekzistu!
- Malestimo ne plu ekzistu!
- Kalumnio ne plu ekzistu!
- En Ĝojlando ĉiu domo havu almenaŭ unu muzikilon!
- Ĉiusemajne okazu karnavalo!
- Ĉiu infano havu skotereton!

Venis mia vico. Kion mi aldonu? Oh jes! Mi volas, ke ĉiu infano havu almenaŭ unu katon. Sed mi forgesis la vorton. Subite, en mian kapon venis la vorto en la rumana. Sed ĝis tiam... ni ĉiuj parolis... Esperanton! Mi pensis: “Ne eblas... Mi eklernis Esperanton je la aĝo de 58... Mi estas nun 60-jaraĝa... Mi vekigi el sonĝo... Kie estas nun Ĝojlando? Ĉu mi perdis ĝin?”

Post kelkaj momentoj mi pensis: “Ne, mi ne perdis ĝin. Ĝi ĉiam estas en mia koro.”

Mi rememoris la lastajn vortojn de nia instruistino tiutage:

- Se vi volos pli bonan mondon, vi ja kapablos plibonigi vian animon kaj vian menson, legante kaj lernante kiel eble plej diligente. Por tio vi vizitas lernejon. Kiu volas plibonigi la mondon, tiu devas unue plibonigi sin mem. Kiam ĉiu el ni plibonigos sin mem, tiam ni vivos en Ĝojlando!”

Ekde tiam mi ofte ludas tiun ludon. Mi ofte demandas min: “Kia estu mia Ĝojlando?” Kaj novaj ideoj aldoniĝas al la malnovaj respondoj. En la aĝo de 58 mi malkovris Esperanton, kaj mi deziris, ke ĉiuj infanoj lernu kaj sian denaskan lingvon kaj Esperanton. Tiam, en Ĝojlando de mia koro, mi volintus eklerni Esperanton kune kun la rumana, ekde la unua klaso de lernejo... La sonĝo malkaŝis mian deziron...


Tiun sonĝon Luiza sonĝis en la jaro 2007, estante lernantino de koresponda kurso pri Esperanta kulturo de Boris Kolker. Mi estas ege danka, ke ŝi decidiĝis priskribi ĝin por la legantoj de *Juna Amiko*.

La Konkursa Tasko estas jena: Priskribu vian Ĝojlandon kaj desegnu aŭ pentru bildoj(n), kiu(j) bildforme prezentos Ĝojlandon de Luiza.

La konkursan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko ‘Konkurso – legendo’ ĝis la 30-a de junio 2020 al la adreso:

Europejskie Centrum Edukacji
Międzykulturowej, ul. Kołłątają 26A,
PL- 50-007 Wrocław, Polska.

La valorajn premiojn fondis Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (pole: Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej).



Ĉi tiun desegnaĵon desegnis la filino de Luiza Carol. Tiam ŝi havis 7 jarojn.

En ŝia Ĝojlando la fiŝoj promenis pere de porteblaj akvarioj, por ke ili ankaŭ ĝuu la belecon de la surtera naturo. La hundoj surmetis ĉapojn, por

protekti sin kontraŭ la forta suno.

Nun la filino de Luiza Carol estas 40 jarojn pli aĝa. Ŝi estas grafikistino kaj klopodas plibeligi nian mondon pere de siaj grafikaĵoj. Ŝi nomiĝas Luch Ofer kaj ŝiajn grafikaĵojn vi trovos ankaŭ en la libro de Luiza.



Mireille Grosjean

Kiom stultan ideon mi havis...

Ĉu malseka malantaŭ la oreloj?

Mi estis 8- aŭ 10-jara. Post duŝado mi sekigis mian korpon zorgeme, ĉefe la kaŝitan parton malantaŭ la oreloj.

Kial? Ĉar miaj gepatroj ofte diris al mi: “Vi ne estas seka malantaŭ la oreloj!” Tiu frazo en la franca lingvo signifas: “Vi ankoraŭ estas infano,

kio signifas: vi komprenas, kiam vi estos pli granda!”. Do, mi frotis kaj frotis, pensante, ke mi fariĝos plenkreska pli rapide! Stulte, aŭ naive...

Ĉu en via lingvo ankaŭ ekzistas tia esprimo en la buŝo de plenkreskuloj, por emfazi la etan aĝon?

En mia regiono, apud Neuchâtel kaj La Chaux-de-Fonds en Svislando, estas esprimo por klarigi al infano: “Tio okazis, kiam vi ankoraŭ ne estis naskiĝinta”;

en la franca: “Tio okazis, kiam vi ankoraŭ estis en la nebulo de la valo de La Sagne”.

Rigardu tiun vilaĝon en belega valo. Ofte kuŝas nebulo en tiu valo, pro tio aperis tiu eldiro. Tiel miaj gepatroj parolis al mi pri la tempo antaŭ mia naskiĝo. Ĉu en via lingvo ankaŭ ekzistas tia esprimo por paroli pri la antaŭnaskiĝa tempo?

Se vi respondas JES al unu aŭ al la du demandoj de tiu teksto,


bonvolu verki artikolon pri la esprimo en via lingvo kaj sendi vian mesaĝon al mi, aŭ al la redakcio. (La retadresoj estas en la revua kolofono, p. 3).



Luiza Carol

Fascinaj kutimoj kaj festoj

Pri la libro “Ĉinaj tradiciaj festoj” de Ĉji Ŝing, Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1987, 124 paĝoj.



Tiu ĉi libro prezentas per agrabla kaj atentokapta stilo la ĉefajn tradiciajn festojn de Ĉinio. En la antaŭparolo oni trafte konsideras ĉiun feston kaj kutimon “fenestro, tra kiu oni povas koni la pensojn, intereson kaj vivon de la prapatroj de la ĉina popolo”. En la sama antaŭparolo oni arigas la festojn en kvar kategoriojn laŭ iliaj signifo.

La unua kategorio inkluzivas festojn kaj morojn, kiuj rememorigas pri historiaj eventoj kaj herooj. Unu el la plej belaj ekzemploj ŝajnas al mi la festo, dediĉita al la fama kaj tre amata ĉina poeto Ĉju Jŭan (340-278 a.K.). Seniluziigita pri la malfeliĉoj, kiuj skuis la socion de Ĉinio, la poeto sin dronigis en la rivero Milŭo en la provinco Hunan. Onidire oni venis el multaj lokoj por serĉi lian korpon pere de boatoj, sed oni ne sukcesis trovi ĝin. Ekde tiam, por honorigi lian spiriton, oni organizas boatludojn kaj oni kuiras apartan manĝaĵon en la tago de lia sinmortigo. Ĉar tiu evento kongruis kun eĉ pli malnova ĉina “Festo de Drako” (laŭ la draka totemo de antikva gento), oni kutimas ornami la boatojn per drakokapoj kaj tiel la du tradicioj kunfandiĝas.

Kiu scivolas ekscii pli multon pri tiu grava romantika poeto, tiu povas trovi en la reto esperantlingve interesajn

materialojn en la revuo “El Popola Ĉinio” de la 21-a majo 2014 kaj 16-a de junio 2014: “Ĉju Jŭan, granda patriota poeto” (partoj unu kaj du).

La dua kategorio inkluzivas festojn, rilatantajn al mitoj kaj legendoj. El tiu kategorio mi plej aprezis la feston nomatan “Vespero de Duobla Sepo”. La aŭtoro konsideras ĝin “fantazio en la somera stelplena nokto”. Tiu ĉi festo baziĝas sur la bela legendo pri kortuŝa amo inter la bovisto kaj feina teksistino.


Laŭ la legendo Ĉiela Reĝo ne toleris ilian geedziĝon malgraŭ tio, ke ili jam havis du infanojn. Ĉiela Reĝo perforte disigis la geedzojn por repreni la feinan teksistinon en la ĉielan kortumon. La sekvan parton mi rakontos per la vortoj de la aŭtoro: “Tuŝita de ilia fidela amo, la bonkora fenikso venigis ĉiujn pigojn de la mondo por fari ponton trans la ĉiela rivero. La piga ponto ebligas al la geedzoj intervidiĝi en la vespero de la 7-a tago de la 7-a monato. Laŭdire, tiutage de la ĉielo falas sennombraj plumoj pro tio, ke ĉiuj pigoj en la mondo flugas por transponti la ĉielan riveron por Bovisto kaj Teksistino.”

La tria kategorio inkluzivas festojn por honorigi la prapatrojn kaj la diojn. El tiuj festoj mi mencios ĉi tie iun, kiu ŝajnis al mi aparte originala kaj interesa: la festo de la kultado al Kuireja Dio. Nuntempe tiu festo kaj la moroj, rilatantaj al ĝi, konserviĝis nur iomete kaj nur en malmultaj lokoj de Ĉinio. La festo baziĝas sur bela kaj edukvalora legendo. Ĝi temas pri malsaĝa edzo, kiu forpelis sian senkulpan bonan edzinon laŭ la malbona influo de alia virino. Post kelkaj jaroj, kiam li fariĝis almozulo, li atingis iun domon, kiu evidentiĝis esti ĝuste la posedaĵo de lia unua edzino. La homo tiom hontis pri siaj kulpoj, ke li kaŝiĝis en la fornon,



kie li mortis. Post kelkaj tagoj ankaŭ la eksedzino mortis pro granda bedaŭro. La Ĉiela Reĝo estis kortuŝita de tiu tragedio kaj decidis, ke la malfeliĉa paro fariĝu Kuireja Dio kaj Kuireja Diino, kiujn oni honorigu en la kuirejoj. Mi ŝatas tiun rakonton, ĉar ĝi atentigas pri la valoro de bonkora kaj saĝa virino kaj pri la respekto, kiun ŝi meritas, kvankam ŝi vivis en pasinta epoko, kiam oni ne sufiĉe aprezadis virinojn. Krome, mi ŝatis la fakton, ke la tuta historio, kvankam tragedia, finiĝas per sincera bedaŭro flanke de la edzo, tutkora pardono flanke de la edzino kaj varma afablo flanke de Ĉiela Reĝo... Do, temas pri surtera tragedio, kiu tamen evoluas al ĝojiga harmonio en la transmondo.

Estas interesaj ankaŭ la kutimoj, ligitaj de tiu legendo. Kuirejan Diinon oni ne pritimas, ĉar ŝi estis ĉiukaze bonkora kaj pardonema dum sia homeca vivo. Tiu, kiun oni pritimas, estas Kuireja



Dio, ĉar dum sia homeca vivo li estis malvirta. Diras la aŭtoro: "Sed pri Kuireja Dio oni ĉiam estis maltrankvila kaj preferis glui lian buŝon per la sukeraĵoj, ke li povu diri nenion al Ĉiela Reĝo." Do oni timis, ke Kuireja Dio povus denunci la malvirtojn de la homoj, dum la bona Kuireja Diino estus tolerema.

La kvara kategorio inkluzivas festojn, okazantajn jarfine kaj jarkomence por bonaŭguro. Oni priskribas belajn gajajn kutimojn. Jen ekzemploj: eksplodigo de petardoj, verkado de printempaj versparoj, kreado de novjaraj pentraĵoj, preparo de novjaraj manĝaĵoj, diversaj novjaraj distraĵoj, konkursoj pri tamburado, "leondanco", la festa foiro de Pekino, la Florfoiro de Kantono.

En la libro la leganto trovos multegajn belajn festojn kaj tradiciajn kutimojn kaj de la hanoj (la plej multenombra etno de Ĉinio) kaj de la naciaj malplimulto.

Luiza Carol:

Vero vivos

Svarmas malveroj en dikaj manlibroj pri la nuntempo kaj pri historio. Plenas ĵurnaloj je falsaj priskriboj generacio post generacio.

Tro multaj homoj klaĉadas pri tio kion neniam neniu ekkonis. Tro multaj homoj konsilas pri ĉio kvankam neniam neniu scipovis.


Plenas la mondo je aĉaj malveroj disvastigataj pro homa nescio, krom mensogaroj kaj mensogeroj disvastigataj samkiel rabio.

Vortoj de vero perdiĝas en vento, spurojn de vero la sablo forviŝas, revoj pri vero fariĝas lamento kiu dolore, korskire fandiĝas.

Muĝas la voĉo de fikalumnio; vero kaŝiĝas en nest' de l' silento. Serĉi la veron fariĝas defio pli kaj pli akra en nia jarcento.

Varman gratulon, ho, juna amiko kiu aprezas la flustron de l' vero, dum la malver', kiel falsa muziko fie bruegas surdige sur tero.

Spite al ĉio la vero ne mortas, ĉar ĝiaj semoj subgrunde ekdormas. Mute, mirakle, la semoj kaŝiĝas eĉ dum jarcentoj, sed poste vekiga.



Rubrikestro:
Elena Nadikova,
Esperanto-klubo "Betuleto"
Lernejo/Ŝkola 56,
pr. Traktorostroitelej, 38
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio
lena_esperto@mail.ru



Filmfestivalo Mia Asocio, Mia Urbo

Saluton, karaj legantoj!

Interkultura mondo esperas, ke vi ĉiuj estas en bona sanstato! Ja tio estas la plej grava en nuna malfacila tempo.

Pandemio daŭras, bedaŭrinde. Multaj aranĝoj, projektoj kaj iniciatoj estas nuligitaj. Landoj estas en kvaranteno. Tamen la vivo ne haltis! Certe, ĉio poiome pliboniĝos. Ni sendube kredas al tio kaj tolereme atendas.

Por iom amuzi vian memizoladon, Interkultura Mondo proponas... – vojaĝi tra la mondo kaj Esperanto-movado. Kiel? Ni rakontos al vi ĉi-numere pri la



nova interesa iniciato de esperantistoj. Temas pri la komuna projekto de UEA – Universala Esperanto-Asocio kaj ĈRI – Ĉina Radio Internacia.

Juna Amiko jam rakontis pri diversaj projektoj de ĈRI. La lasta materialo estis dediĉita al la fama filmkonkurso de ĈRI "Teo kaj Amo" (vidu la numeron 1/2018). Ĉi-foje temas pri nova iniciato "Mia Asocio, Mia Urbo". Tio estas la unua monda filmkonkurso, lanĉita aŭtune de 2019, omaĝe al la 55-jariĝo de la Esperanta disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia.

La projekto havis du celojn. La unua: diskonigi Esperanto-asociojn, ekzistantajn en diversaj lokoj de la mondo kaj tiel Esperanton mem, certe. La dua celo estis






popularigi lokajn kulturaĵojn de tiuj urboj, kie situas Esperanto-asocioj. Ĉiuj filmoj devas havi Esperantistajn subtekstojn. La ĵuĝa komisiono konsistas el Selena Wang Fang, la direktorino de Esperanto-radio de ĈRI, Wang Weishi, Qiu Jieming, Aleks Kadar, Fernando Maia Jr. kaj Trezoro Huang Yinbao. Jen kion diris Fernando Maia Jr., unu el la iniciatintoj de la filmkonkurso: “Kiel Vicprezidanto de UEA, mi ŝatus unue elkore danki al Selena, nome de ŝia teamo kaj de Ĉina Radio Internacia, pro la atingoj de la filmkonkurso. Tiuj atingoj simple ne eblus, se ne per la forto de la historio de ĈRI kaj ties teamo. Por komenci, la ideo pri la programero naskiĝis en la sino de ĈRI el la kreemo de ĝiaj ĵurnalistoj. Poste UEA utilis por atingi pli vastan publikon kaj allogis aliajn kontribuojn. Mi esperas, ke la kunigo de tiuj fortoj estos pozitiva por ĈRI, samkiel ĝi estis por UEA. Certe tio estis pozitiva por la monda Esperanto-komunumo, kiu ĝuas nun aron da filmoj, festantaj la kulturalan riĉecon de Ĉinio kaj de aliaj landoj. Ni estas aparte fieraj pro la bonkvalito de la teknika traktado fare de la teamo de ĈRI al ĉiu sendita filmeto. Ili fariĝis nun vera trezoro por montri Esperanto-agadon tra la mondo kaj valoraj iloj por montri lokajn kulturaĵojn de la diversaj urboj sur nia planedo. Mi fidas,

ke tio estis digna maniero festi la 55-an jariĝon de la disaŭdigo en Esperanto de ĈRI. Mi estas vere ĝoja kaj havas esperon pri novaj kunlaboroj kun ĈRI. Tio estas bonega maniero por kunagadi por tiu grava lando, en kiu UEA havas signifan nombron da membroj. Fine mi danku al nia Vicprezidanto Trezoro, kiu modele kunlaboris kun Selena, kaj al ĉiuj esperantistoj, kiuj kontribuis el siaj landoj kaj asocioj por la konkurso”.

La rezultoj de la konkurso estis jenaj. Ĝis la fino de 2019 la partoprenintoj sendis entute 35 filmojn pri 30 urboj kaj asocioj el 15 landoj en 5 kontinentoj. Ĉina Radio Internacia mem preparis 11 filmetojn. Impona rezulto, se konsideri bezonatajn por filmado profesiajn scipovojn, ĉu?

Ĉiuj filmoj estis publikigitaj en la kanalo de UEAviva: <http://youtube.com/ueaviva>. La plejparto de la filmetoj ricevis kelkcentojn da vidoj ĉe Youtube. La plej populara ricevis pli ol mil. Kaj indas menci ankaŭ alian rezulton de la konkurso: la kvanto de abonantoj en la kanalo rapide kreskis de ĉirkaŭ 700 ĝis 1100. Krome, kiel substreki la organizantoj, la konkurso malfermis aliron al pluraj Esperanto-grupoj tra la mondo. **Do, interkulturaj iniciatoj sekvigas disvastigon de Esperanto kaj ĝia movado.** Jen estas la ĉefa konkludo!



Estas interese, ke la unuan premion ricevis la filmo el la urbo, kie ne ekzistas klubo. Kaj la lando mem neniam havis nacian Esperanto-asociacion. Temas pri la urbo Minga Guazú en Paragvajo. La aŭtorino nomiĝas Aleksandra Mendieta. Laŭ la opinioj de jurio, la filmo estas atkvalita, kun klara parolmaniero kaj bona muntado. Ĝi tenas la atenton de la spektantoj kaj evitas tedajn paroladojn. La aŭtorino parolis pri siaj personaj spertoj kun la lingvo kaj pri sia grupeto de lernantoj. La filmeto montras la urbon, parolas pri la indiĝena lingvo, la gvarania (oficiala lingvo de Paragvajo), naturo en la urbo (preskaŭ ĉiu domo havas arbon) kaj populara loka trinkaĵo. La gajnintoj ricevis bonajn premiojn, interalie senpagajn aliĝojn kaj eĉ partoprenojn en la planita UK. Tamen la ĉefa valoro, sendube, estas okazo prezenti la agadojn de esperantistoj tra la mondo. UEA rezervas difinitan sumon por laŭeble donaci membrecojn kaj abonojn de la revuoj “Esperanto” kaj “Kontakto” al la asocioj, kluboj kaj grupoj, kiuj partoprenis la konkurson. Krome UEA planas prezenti premiatajn filmojn dum ontaj E-kunvenoj. Nun en la paĝaro <http://youtube.com/ueaviva> troviĝas jam 33 filmetoj.

Ili prezentas (krom la menciita supre Minga Guazú) plej diversajn urbojn tra la tuta mondo. Inter ili estas Atlanto (Usono), Taŝkento (Uzbekio), Svitavy (Ĉeĥio), Lausanne (Svislando), Bujumbura kaj Rumonge (Burundo), Kalio (Kolombio), Liptovio kaj Partizánske (Slovakio), Parizo, Orleans, Fleury les Aubrais kaj San Briego (Francio), Querétaro (Meksiko), Parma, Florenco kaj Modeno (Italio), Rio de Janeiro, Natalo kaj Florianopolo (Brazilo), Krakovo (Pollando), la ĉinaj urboj Xi'an, Ŝanhajo, Changzhou, Yunnan, Suzhou. Jen kia vasta geografio de la konkurso!

Do, karaj legantoj, bonvenon! Ni ne povas malproksime moviĝi fizike dum la pandemio. Tamen virtuale, **danke al Esperanto**, vojaĝi tre facilas!

La filmkonkurso daŭris ĝis la 15-a de decembro, kiam esperantistoj festas Zamenhof-Feston. Tamen la projekto tiam tiel plaĉis al niaj samideanoj, ke aperis ideo ripeti ĝin. **Ja estas bona okazo disvastigi mondscale informon pri siaj urbo kaj Esperanto-asocio.**

UEA kore invitas interesigantojn filmi ĉi-jarajn aranĝojn en la Zamenhof-Festo, por pretigi novajn filmojn por la konkurso en 2020. ILEI kaj *Juna Amiko* aliĝas al tiu





alvoko de sia partnero kaj invitas ĉiujn siajn membrojn, abonantojn kaj ne nur, partopreni en tiuj interesaj projektoj!
Guu mem kaj disvastigu Esperanton

por tuthomara prospero! Interkultura Mondo esprimas koran dankon al sinjoro Fernando Maia Jr. kaj Ĉina Radio Internacia pro la disponigitaj materialoj!



Mila – grava figuro en konstruado de pli bona mondo

La 13-an de decembro 2019, en Hago, Nederlando, en maljunuldomo, mortis la homo kun granda koro, Mila van der Horst-Kolińska.



Pri la morto de Mila mi eksciis de mia amikino ĉi-jare januare, kiam mi preparis informojn pri la nuna, jam la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kie Mila estis ĉiujare la honora patrono. La informo pri ŝia morto estis por mi granda ŝoko... Ŝi ĉiam estis energia, dinamika, aktiva, rapide parolanta, plena de vivo kaj ege helpema... Tiu bildo de Mila restos kun mi kaj ankaŭ ŝia vivmoto “Unu belon havas homo, dum la tera vivo. Amikeco ĝia nomo, amikeco kora, vera”.

Mi ekkonis Mila'n koresponde. Ŝi trovis min, sendante iun demandon. Tiu kono tuj, jam de la unuaj vortoj, transformiĝis en profundan ligan, amikecon kaj fidon. De tiu momento ankaŭ ekŝanĝiĝis mia vivo, mia perceptado de la mondo. Ĉiusemajne lunde matene ni havis telefonan renkontiĝon. Ni serĉis, kie okazas private Esperanto-kunveno. Mi ege ŝatis tiujn renkontiĝojn, ĉar Mila estis “vivanta historio” de Esperanto-movado. Ŝi konis multajn gravajn personojn, kaj scipovis sincere ilin priskribi sen ilia “eksterordinareco kaj legendo”.

Ŝi ege kredis je destino. Laŭ ŝi ni ankaŭ ekkonis unu la alian dank' al la destino. Ŝi scipovis prezenti multajn ekzemplojn kiamaniere la destino influis ŝian vivon. Ŝi tiel forte kredis je destino, ke sian biografion ŝi titolis “Destino”. Mi estis ege surprizita, ricevante de ŝi preskaŭ tuj post nia ekkono tiun biografion. Legante

ĝin mi pli bone ekkonis Mila'n. Ŝi naskiĝis la 26-an de aprilo 1927 en Parafianów en Pollando, kiel Mirosława Kasprzak (Esperante: Kaspŝak). Ŝia patrino estis filino de pol-rusa paro, la patro polo. Ŝi pasigis sian infanecon en bela domo kun granda ĝardeno, konstruita de la gepatroj, ekster la urbo. Ŝi amis legi librojn, plej multe biografiojn,

kaj tiujn librojn ŝi havis en sia hejma biblioteko. Havante 9 jarojn Mila provis trovi respondon je la demando: Kial oni devas paroli pole, ruse, jude, germane kaj ne per komuna lingvo, kiun scios ĉiuj homoj? Tiam ŝi ankoraŭ ne sciis, ke tiu komuna lingvo jam ekzistas kaj ĝi nomiĝas Esperanto. Ŝi ĉiam, ankaŭ en sia biografio, substrekis, ke la plej grava fakto en ŝia vivo estis lernado kaj poste instruado de la lingvo Esperanto. Esperanto fariĝis celo kaj pasio de ŝia vivo. Ĝi malfermis al ŝi la vojon al bela mondo kaj ankaŭ estis por ŝi konfirmo, ke la destino ekzistas. Ŝi opiniis, ke estas malpermesite neglekti la signojn, kiujn donas al ni destino, kaj oni devas sekvi ilin kaj tiam ni atingas feliĉon. Mila estis feliĉa malgraŭ tio, ke ŝi multfoje dum la tuta vivo ricevis ankaŭ batojn de esperantistaro. Tio dolorigis ŝin, sed ŝi opiniis, ke malbonaj agoj multe pli dolorigas tiujn, kiuj ilin faras. Ŝi forĵetis tiujn malagrablaĵojn el sia memoro. Mi multe ellernis de ŝi. Mi ankoraŭ nun aŭdas ŝian fortan voĉon: “Sekvu bonon kaj bonon atendu, forĵetu timon kaj vi estos feliĉa”. Ŝi neniam timis kaj ŝatis substreki, ke dank' al sia zodiak-signo Taŭro, ŝi estas praktika, laborema, obstina kaj bone organizita. Ŝi ofte ripetis, ke ŝi apartenas



Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj

Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej

LA 8A EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ
okazos **ĈI-JARE RETE**

kun speciala dediĉo al
MILA VAN DER HORST-KOLIŃSKA

- **Ĝis la 15-a de aŭgusto 2020** – Provaŭdo de la partoprenantoj ĉi-jare per interreto laŭ ricevitaj filmetoj
- **La 12-an de septembro 2020** – Koncerto de la premiitoj

La festivalo ĉi-jare okazas en septembro per interreto, sed en la samaj du kategorioj: 1. koruso aŭ ensemblo, 2. solisto.

Aĝo de la partoprenantoj: de 6 ĝis 111 jaroj.

Ĉiu partoprenanto ĉi-jare kantas nur unu kanton en Esperanto <https://www.facebook.com/efekantoj/>

PRITAKSAS INTERNACIA ĴURIO



HONORA PATRONADO

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
PREZIDANTO DE VROCLAVO JACEK SUTRYK
EUROKKA
INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ
PREZIDANTO DE LA KOMISIONO PRI EDUKADO KAJ JUNULARO BOHDAN ANISZCZYK

AMASKOMUNIKILA PATRONADO

JUNA AMIKO
INTERRETA RADIO KSON

ORGANIZANTO: EUROPEJSKIE CENTRUM EDUKACJI MIĘDZYKULTUROWEJ
LA EŬROPA CENTRO DE INTERKULTURA EDUKADO

Sendu vian aliĝilon ĝis la 15-a de aŭgusto 2020 – ATENDAS VIN MULTAJ BELEGAJ PREMIOJ!

Ĉiaj informoj estas riceveblaj ĉe la adreso: festivalo.eo@gmail.com (skribu en la temo de la mesaĝo: E-kanto) aŭ telefone +48 692 551 131, +48 512 456 449, +48 694 229 219 www.ecem.com.pl <https://www.facebook.com/efekantoj/>



al tiuj virinoj, kiuj kuraĝis vivi laŭ propra stilo, kaj neniam klopodis plaĉi al la aliaj. Sincere ŝi konfesis, ke ŝi ne ŝatas okupiĝi nur pri kuirado kaj purigado de loĝejo, ĉar oni devas havi memstaran laboron, kiu montras ŝian valoron kiel homo, kaj la hejmlaboroj nur stultigas ŝin. Varme ŝi rememoris sian volontulan laboron en Internacia Esperanto-Instituto, siajn kursojn laŭ la aŭdvida metodo de Tibor Sekelj, kiun ĉiam ŝi donis kiel ekzemplon por imiti. Ŝi fieris, ke oni nomas ŝin la "Patrino de Mazi", ĉar dank' al ŝi realiĝis la Esperanto-versio de la konata kaj tiam tre populara kurso "Mazi en Gondolando" (vidu <http://jubilo.ca/esperanto/mazi>).

Ŝi ankaŭ ofte substrekis sian feliĉan vivon kun la edzo, esperantisto Gerard van der Horst, kaj kiom ili ambaŭ devis suferi, por finfine esti kune. Gerard estis efektiva de ŝiaj revoj pri la viro. Li do devis havi "interesan enhavon, kaj do la karakteron, inteligentecon kaj spritan bonhumoron". Ŝi ofte diris al mi, ke "ĉiuj malfacilaĵoj, kiuj aperas sur nia vivovojo, instruas nin kiel venki ilin. Dank' al tio ni fariĝas pli fortaj kaj bonaj. Gravas ankaŭ, ke ni estu optimistoj, ĉar tiu eco multe helpas en la vivo. Kaj neniam ni estu al ni mem malamiko, sed ni amu nin, ĉar tiam ni scipovos disdoni feliĉon".

Mila van der Horst-Kolińska pro sia multflanka Esperanto-agado ricevis multajn distingojn kaj fariĝis honora membro de gravaj Esperanto-organizaĵoj, UEA, ILEI, SAT... Por ŝi tiuj ĉiuj honorigoj kaj distingoj ne estis la plej alta valoro, sed nur rimedo por realigi tion, kio vere

valoris en ŝia vivo, kio feliĉigis ŝin. Ŝin feliĉigis popularigi Esperanton, enkonduki ĝin en la praktikan vivon, montri ĝian valoron al la ekstera mondo. Pro tio ŝi tiom entuziasme akceptis kunlaboron kun Instituto por Oficialigo de Esperanto (IOE).

Kiam ŝi transloĝiĝis en maljunuldomon, finiĝis niaj telefonaj kontaktoj. Mi jam ne havis eblecon senpere kontakti kun ŝi, sed mi sentis ŝian ŝirmon. Ŝi ĉiam diris, ke ŝiaj anĝeletoj estas ankaŭ kun mi, ĉar laŭ ŝi mia destino estas Esperanto-vojo kaj ŝia destino estis trovi min kaj helpi tion kompreni. Mi ĉiam estos al Mila ege danka pro ŝia vera Esperanto-koro kaj granda helpo, kiun mi ricevis de ŝi. Mi neniam forgesos tagon, kiam mi transdonis al ŝi mian ideon krei kantfestivalon, Eŭropan Festivalon de Esperantaj Kantoj, kiu ĉi-jare okazos jam la okan fojon, kaj escepte interrete, pro la koronavirusa pandemio... Ŝi ĉiujare estis honora patrono de la festivalo, kaj ĉiam ŝi estis ĉe mi precipe dum ĉiuj malfacilaj momentoj. Tiam ŝi aldonis al mi kuraĝon per vortoj: "viaj sukcesoj ne al ĉiuj plaĉas, neglektu tion, ĉar la plej bona vojo estas daŭrigi laboron, kiu plaĉas al vi, kaj kiun vi opinias valora. Mi la samon iam travivis. Fidu min".

Mila van der Horst-Kolińska certe ne estas unusignifa figuro, sed por mi ŝi ĉiam estos belega homo kaj esperantistino kun grandega Esperanto-koro, kiu heredigis al ni ĉiuj multajn valoraĵojn, sed antaŭ ĉio belegan vivkoncepton en konstruado de pli bona mondo.

Małgosia Komarnicka



Transjara Kurskunveno de EPA

Inter la 30-a de decembro kaj la 2-a de januaro 2020 okazis Transjara Kurskunveno de Esperanto-Populariga Asocio, satelita organizo de Oomoto¹ pri Esperanto, en ĝia centro en Kameoka, gubernio Kioto, Japanio.

Partoprenis en ĝi 23 koreoj, 18 nepalanoj, 1 ĉino kaj 70 japanoj, sume 120 personoj. 57 el ili estis junaj, de 7- ĝis 35-jaraj. Do, tiu ĉi kurskunveno estis internacia kaj plena je energio de juneco.

La geknaboj japanaj kaj koreaj lernis Esperanton en la sama klaso. Ili kantis Esperantajn kantojn kune, kaj ludis amuzajn ludojn. Nepalanoj lernis Esperanton per la angla kaj la klaso por libera konversacio estis gvidita de koreino. Krom tiuj, aliaj 5 klasoj paralele okazis.

La programeroj estis tre abundaj; prelegoj, komuna ekzercado de la himno de Oomoto, filmado de gratulmesaĝo por malferma ceremonio de la 76-a IJK en Nederlando, ekzamenoj de EPA, ĉiunokta babilado kun trinkaĵoj.



La plej arda el ili estis Interkona Vespero, kiu okazis en la fina tago de la jaro. Muzikanto el Tokio prezentis la Esperantan kanton "Grandan Familion", kiun li mem komponis. Ankaŭ propra danco por ĝi estis farita. Akorde al la kantado gejunuloj kaj geknaboj plene ĝuis la dancon. Krome geknaboj el Koreio kaj Japanio kune kantis Esperantan kanton. Sekvis tradicia popola danco de nepalaj studentoj kaj kantadoj de koreaj viroj. Poste ventroparolado, paperteatraĵo kaj danco "Paprika" prezentigis fare de japanaj infanoj (ege populara lastjare inter japanoj).

Sekvis ĉe la fino du dancoj "Miroku" kaj "Aŭa". Danco Miroku estis farita de la Kunfondinto de Oomoto Deguĉi Onisaburo. Gvidite de la kantado kun taktokriadoj de belaj knabinoj, kiuj surmetis japanan tradicion vestaĵon Jukata, ĉiuj kune rondirante vikle dancis. Aŭa-danco estas konata tradicia danco en gubernio Tokushima sur la insulo Ŝikoku.

Ĉi tiu kurskunveno okazas ĉiujare ekde 1961/1962. La jaro 2023 estos la 100-jara datreveno de la fondiĝo de EPA. Por la jubileo ni esperas pli da vigleco kaj internaciigo de la Transjara Kurskunveno. Karaj legantoj de *Juna Amiko*, ni atendas vian partoprenon!

Okuŭaki Toŝiomi, ĝen. sekretario de EPA



1) Oomoto estas japana religio, bazita sur la tradicia japana kulturo, montranta altan respekton por aliaj religioj kaj kulturoj.




AMO tra la ŝtormo


Seminarioj pri Aktivula Maturigo (AMO) ĝis nun okazis ĉiam en kunsidoj, kiuj kunvenigis homojn el pluraj landoj.

Depost la fondo en marto 2014, la programo estis organizita ene de ok monatoj: seminarioj en kvar kontinentoj. La enhavo de la seminarioj klopodis esti ne nur serio de prelegoj, sed enhavis trejnajn seminariojn kaj diskutojn. Foje okazis forumoj, foje laborado en etaj grupoj. Laŭ la ege limigitaj rimedoj, la rezultoj kaj rekomendoj el la seminarioj estas dissenditaj kaj vidigataj en la reto.

En januaro 2020 okazis la lasta ĉeesta seminario numero 62. Tio okazis en Aŭklando, la plej granda urbo en Nov-Zelando, kun partopreno de la prezidanto de UEA Duncan Charters. Per tio la AMO-programo atingis sian kvinan kaj lastan kontinenton. Neniu imagis, ke la programo ne pluiros al plia serio de ĉeestaj seminarioj. Subite la pandemio ŝanĝis ĉion. La fizika seminario numero 63 devis esti nuligita; ene de monato sekvis la unua perreta (virtuala) seminario. Danke al la helpo de la esperantistoj pere de Irano, ni sukcesis organizi seminariojn numeroj 63 (kadre de la irana kongreso) kaj 64 (memstare). Nun ni aktive laboras



La rubrikon
prizorgas:
Stefan MacGill



pretigi la seminariojn 65 (fine de junio) kaj 66 (en la 31-a de julio, kadre de la Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI (VEKI).

Ni demandas nin, kiam ni povos organizi la sekvan AMO-seminaron kun fizika arigo de partoprenantoj, kaj ĝis tiam, kiom da virtualaj seminarioj okazos? Intertempe, la grupo de esperantistoj restas aktiva, adaptas sin al la devigo por izoliĝo; tiu sama komunumo liveras multajn servojn kaj proponojn kaj AMO ludas gravegan rolon en tiu servado al nia propra parolantaro.

AMO adaptas sin, AMO navigas brave tra la virusa ŝtormo.

Vortklarigoj

Fondo: starigo, estigo. **Trejnado:** instruado, kiel agi praktike. **Rimedo:** tio, kio servas por atingi celon. **Pandemio:** tutgloba epidemio – mond-malsano. **Navigi:** trovi la vojon, kutime en ŝipo sur la maro. **Brave:** Kuraĝe.



Landaj Rerezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

Aŭstralio: Aŭstralia Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001; *info@esperanto.org.au*. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; *aon.913548977@aon.at*. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; *financoj@fel.esperanto.be*. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; *belabutiko@esperanto.org.br*. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; *eab@esperanto.org.uk*. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; *mrvp@interpres.org*; *ilei@espereto.com*. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; *polnickypavel@seznam.cz*; *cea.polnický@quick.cz*. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; *strigo@esperanto.cl*. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; *arko.gong@qq.com*. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; *arnecasper@yahoo.com*. **Estonio:** Ahto Siimson; Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Pärnumaa; *ahto.siimson@esperanto.ee*. **Finnlando:** Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as 10, FI-28430 Pori; *paula.niinikorpi@gmail.com*. **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; *esperanto-france@esperanto.org.net*. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; *wolfgang.schwanzer@esperanto.de*. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; *zsofia.korody@esperanto.de*. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid; Kataluna Esperanto-Asocio, Apartado 1008, ES-08200 Sabadell, *sandra@esperanto.cat*. **Hungario:** Jozsef Nemeth, Fo u. 41/5, HU-8531 Ihász; *jozefo.nemeth@gmail.com* (por superaj membroj de ILEI); Stefan MacGill; *stefan.macgill@gmail.com* (por simplaj abonoj). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; *esperanto@isl.is*. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; *saviogp@netvision.net.il*; *esperantisto@live.com*. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; *silkovojo@aliceposta.it*. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; *esperanto@jei.or.jp*. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; *marija@hes-keu.hr*. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; *irenaa@takas.lt*. **No-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington 6140, *ryangomez@extra.co.nz*. **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatar, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 Kraków; *mtatara@gmail.com*. **Portugallio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; *asocio@esperanto.pt*. **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; *sezonoj@mail.ru*. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; *petro@ikso.net*. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Sten Svenonius, *sten@agado.net*. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; *ch_scheidegger@bluewin.ch*. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; *rezamenhof@yahoo.com*. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; *esp.togo@cafe.tg*. **Usono:** Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103; *eusa@esperanto-usa.org*. **Por vidhandikapuloj:** Vjačeslav Suslov; *gloro59@yandex.ru*. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** *ilei.officejo@gmail.com*.

SUPERNATURA LERNEJO

